

1976 aprilo

69-a jaro

n-ro 844 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

# esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)  
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



# Vi trovos

ke tiu ĉi numero venas al vi relative rapide post la marta numero, kiu vin atingis kun rekorda malfruigo. Estas preskaŭ plezureto ne devi mem transpreni la tutan pezon de la mallaŭdoj pro la malfruo, almenaŭ kiam temas pri tiu marta numero. Do, ĝian esceptan malfruigon kaŭzis la fakto, ke ĝi iris al la poŝto en Antverpeno, de kie oni resendis la tutan kvanton al Roterdamo, subite malkovrinte iun malnovan regulon, laŭ kiu gazetoj ekspedataj en Belgio devas porti kovrilpaĝe kaj koverte la nomon de belga respondeculo pri la eldono. Se vi estas inter tiuj legantoj, kies revuo kutime alvenas en belge afrankita koverto, vi povis vidi, ke ni devis subite eltrovitian respondeculon, malpaki, stampi kaj repaki la tutan kvanton antaŭ ol refoje ekspedi la numeron tra Antverpeno. Nun ni ne plu antaŭvidas similajn ekspedproblemojn, ĉar ni eĉ presis sur nian ĉi-fojan kovrilon la nomon de nia belga respondeculo.

Cetere, ĉi tiu numero alportas plurajn surprizojn, inter kiuj estas ankaŭ du novaj rubrikoj — "Lerneja bulteno" kaj "Ekzameno E". Ni esperu, ke vi ĝuos la numeron. Tamen, denove: Ĝis majo, en majo!

## Enhavo

- 61 Aprila kunsido de la Estraro de UEA: 1975 estis profita jaro
- 62 Deklaro de la Estraro de UEA
- 63 Grava scienca periodaĵo en Esperanto: Ekaperas "Scienca mondo" (Prof. d-ro S. Ĝuĝev)
- 64 Enterigo de Kálmán Kalocsay: Li apartenis al la "titana gento" (Ivo Rotkvić)
- 66 Opinioj: Strategion, ne nur taktikon (d-ro I. Szerdahelyi)
- 67 Lingvoj kaj la ducentjara jubileo: "Lingva banko", Tradukoj: Revua ponto-lingvo
- 68 Enketo pri la Universalaj Kongresoj: Ĉu ĉiam samaj kongresanoj? Kie oni dezirus kongresi? (E.L.M. Wensing)
- 69 Lerneja Bulteno (G. Pirlot)
- 70 Historiaj esploroj: Preterviditaj sociaj faktoroj en la Ido-skismo (Peter G. Forster)
- 71 Novaj japanlingvaj eldonaĵoj: Pli pri Esperanto, Amikiĝi kun libroj
- 72 Recenzoj ("Du komedioj: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo", "Bakĥantinoj", "Nuda vero, La", "Kalevipoeg")
- 73 Laste aperis . . .
- 74 Hungario: Tutlandaj studkonkursoj (Z. Gyarmathy), Pupteatra festivalo: La naŭa PIF
- 75 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 61a Universala Kongreso
- 77 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 78 La membraro de UEA en 1975 (statistiko)
- 79 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Ekzameno E (Bernard Golden)
- 80 Anoncetoj

## La kovrilo

La ruinoj de la templo de Apolono superregas la pejzaĝon de Delfo, celo de unu el tri allogaj tuttagaj ekskursoj proponataj al la partoprenontoj de la 61a Universala Kongreso en Ateno. Tiu templo, post brulo rekonstruita en la kvara jarcento antaŭ Kristo, estis la hejmo de la Pitia Orakolo. Plena priskribo de tiu kaj aliaj ekskursoj aperas en la Dua Oficiala Bulteno, kiun ricevas ĉiuj aliĝintoj al la Kongreso. Freŝdataj sciigoj pri la unua Universala Kongreso en Greklando aperas sur la paĝoj 75-76.

## esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39. Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM. Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910). Redaktoro: Simo Milojević. Aperas monate (escepte de aŭgusto). Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld. Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Ripetrabato 20%. Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804). Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

## Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 286 Iffley Road, Oxford OX4 4AA, Britio; tel. (0865) 47408. Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508. Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150. Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079. Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725. Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando. Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

# 1975 estis profita jaro

ANTAŬ KELKA TEMPO iu forte asertis, ke la t.n. meza aŭ ordinara esperantisto apenaŭ interesiĝas pri estraroj kaj estraraj kunsidoj, pri organizaj kaj financaj problemoj de UEA aŭ alia movada organizaĵo. Cetere, ie sur la sekvantaj paĝoj de ĉi tiu numero troviĝas simila aserto, laŭ kiu denove tiu ordinara esperantisto ne interesiĝas pri la movadaj nomoj aŭ organizaĵoj. Se tiuj asertoj pravus, necesus ŝajne esti kontenta, ke la hodiaŭa ordinara esperantisto entute ankoraŭ interesiĝas pri Esperanto mem. Nu, ĉiukaze ni ne samopinionas kun tiaj ĝeneraligoj. Ni ja facile povas kredi, ke oni ne nepre interesiĝas pri estrarkunsidoj, sed ke oni tiujn interesiĝon aŭ malinteresiĝon ligas al la enhavo de tiuj kunsidoj. Se la kunsidoj traktus pure financajn kaj administrajn problemojn de UEA aŭ de ĝia Centra Oficejo, ne estus mirinde, ke la ordinara esperantista publiko ne interesiĝas pri ili. Tamen, kiam tiuj kunsidoj almenaŭ trifoje jare inventaras la ĉefajn problemojn de la internacia Esperanto-movado ĝenerale, estas malfacile kredi, ke esperantistoj povas ne interesiĝi pri ili.

La tradicia aprila kunsido de la Estraro de UEA ĉi-foje denove okazis en la ĉeesto de ĉiuj ok estraranoj kaj la bezonataj respondeculoj de la Centra Oficejo. La kunsido okazis inter la 10a kaj 12a de aprilo, en la asocia sidejo en Rotterdam, en la ĵus renovigita salono "Aŭstralio", kiu, dank' al malavara donaco de UEA-membro en Berlino, transformiĝis en agrablan konferencon.

## Bona financa rezulto en 1975

Tradicie la aprila kunsido estas grandparte dediĉita al la financo de la Asocio. Malgraŭ tio, ke la financo ankaŭ ĉi-foje grave rolis en la tagordo, la tiurilataj punktoj apartenis al la plej facile solveblaj eroj. Kiel ni jam raportis en nia resumo de la januara estrarkunsido (v. nian revuon, februaro 1976, p.23), la financa rezulto de la pasinta jaro estas tre kontentiga. Dum la ĵusa estrarkunsido estas aprobitaj la spezo-kontoj kaj bilanco de UEA por 1975. Tiuj dokumentoj iras por la fina aprobo al la Komitato en Ateno. Tamen, jam nun eblas diri, ke la jaro 1975 por UEA finiĝis kun profito de ĉ. 26 000 guldenoj. Krome, la Estraro decidis rezervi la sumon de 20 000 gld. el la pasintjara profito por necesaj riparoj de la asocia sidejo en Rotterdam. Tio ja signifas, ke la vera profito de la pasinta jaro estis ĉ. 46 000 gld. Komparante tiujn ciferojn kun la rezultoj de la antaŭaj du jaroj (en 1973 — defcito de preskaŭ 60 000, kaj en 1974 —

defcito de iom malpli ol 40 000 guldenoj), oni povas esti pli ol kontenta pri la nuna mastrumado de la asociaj rimedoj. Estas aparte notinde, ke en la tempo kiam ĉiuj kostoj preskaŭ ĉie en la mondo kreskas, UEA sukcesis atingi, ke ĝiaj elspezoj falu de 1974 al 1975 per 8,7%. En la sama periodo la asocia kapitalo montris tre kontentigan kreskon de 274 800 gld. en 1974 al 347 400 en 1975, kio signifas kreskon de la kapitalo je 26%.

Ĉio ĉi signifas aŭ almenaŭ povus signifi, ke la financa batalo de la Estraro estas gajnita minimume rilate la region de la situacio kaj, ke surprizaj defcitoj en tiaj kondiĉoj ne estas antaŭvideblaj. Kiel ni jam antaŭe atentigis, ĉio ĉi ĉefe ŝuldiĝas al plana okupiĝo pri la financaj demandoj, kiujn inter la estraraj kunsidoj tre funde traktas la Komisiono pri financo kaj administrado. Tiu komisiono unu plian fojon reviziis la buĝeton por ĉi tiu jaro kaj la Estraro decidis plu-sendi ĝin al la Komitato por fina aprobo. Same okazis rilate la buĝeton por la jaro 1977.

Apartan atenton en la aprila estrarkunsido ricevis demandoj kaj projektoj ligitaj al la Financa Programo de la Esperanto-Movado. Tiu Programo, oficiale lanĉita en la 60a UK en Kopenhago, jam montras unuajn pozitivajn rezultojn: ĝis aprilo 1976, la Programo sukcesis akumuli la sumon de pli ol 57 000 guldenoj en formo de donacoj. Pro la fakto, ke nia revuo ĝis nun apenaŭ tuŝis pli serioze la demandojn ligitajn al la Financa Programo, estas interkonsentite, ke nia junia numero estu grandparte dediĉita al la Financa Programo de la Esperanto-Movado. Tio estos okazo por legi ankaŭ pliajn detalojn pri la nuna stato de la financaj rimedoj de UEA.

## Estrara Raporto 1975/76 aperos en nia revuo

En la julia/aŭgusta numero de nia revuo aperos la kompleta Estrara Raporto por la laborperiodo 1975/76. Tiamaniere la raporto denove atingos la plej grandan parton de la asocia membraro. Kvankam ankaŭ pasintjare, kiam la raporto estis presita kiel aparta broŝuro, eblis senpage ricevi ĝin kontraŭ simpla peto al la CO, montriĝis ke nur relative malgranda nombro da homoj utilis tiun eblecon.

Ĝenerale, la kunsido dediĉis grandan atenton al la eldonaĵoj de la Asocio kaj al reguligo de ilia aperado. Estas faritaj tre konkretaj decidoj tiurilate kaj oni povas esperi, ke pluraj el tiaj demandoj baldaŭ reguliĝos. La du serioj de *Esperanto-dokumentoj* ekmarŝis kaj en la tempo de la estrarkunsido jam estis presitaj 5

(3 jam distribuitaj) anglalingvaj kaj 2 esperantlingvaj dokumentoj; kvin pliaj dokumentoj estis en la stadio de finprodukto, dum pluraj aliaj estas preparataj. Kun kontento oni konstatis, ke la longe daŭrinta paŭzo en la eldonado de *La monda lingvo-problemo* ŝajnas esti venkita: lastatempe aperis du pliaj numeroj (15 kaj 16 el la volumoj 5 kaj 6) kaj du aliaj numeroj estas kompostataj.

## Reorganizo de la Centra Oficejo

La Estraro tre serioze okupiĝis pri planoj komplete reorganizi la funkciadon de la Centra Oficejo. Tiuj planoj antaŭvidas, i.a. kreon de nova fako pri esploroj kaj planado, reenkondukon de la posteno de la konstanta kongresa sekretario, plian evoluigon de la Volontula Servo, liberigon de la Oficejo de ĉiuj laboroj, kiuj povus esti sukcese plenumataj ekster ĝi. Ĉar la planoj pri la reorganizo de la CO efektive ŝajnas esti tiaj, ke ili tuŝas la ĝeneralan pluan evoluigon de la asociaj aktivecoj, ankaŭ tiuj planoj ricevos apartan atenton en unu el niaj sekvaj numeroj.

## Nova kotizsistemo ekde 1977

Konforme al siatempa rajtigo de la Komitato (dum la 60a UK), la Estraro decidis venontjare definitive enkonduki novan sistemon de kotizoj en UEA. Esence, temas pri simpligo de la ĝisnuna sistemo de membrokategorioj, kiu faris distingon de sep diversaj ligoj al la Asocio, kun almenaŭ 5 diversaj kotizoj. Ekde la jaro 1977 validos simpligita membrisistemo, kiun eblas jene resumi: UEA havos du fiksitajn kotizojn: unu de 20,- kaj alian de 50,- guldenoj. Oni havos eblecon esti membro kun la Jarlibro aŭ membro kun la revuo *Esperanto*. Se oni estas juna (ĝis inkluzive 25-jara), oni ricevos aŭtomate la junularan revuon *Kontakto*. Praktike, tio ĉi signifas, ke venontjare MJ-kotizo (Membro kun Jarlibro) kostos 5 gld. malpli ol ĝis nun: anstataŭ 25,- oni pagos 20,- gld. Ankaŭ la simpla abono al la

revuo *Esperanto* kostos malpli: 30,- anstataŭ 37,50. Tamen, la baza MA-kotizo (Membro Abonanto) restos senŝanĝa — 50,- gld. Societo Zamenhof restos ekster la kutimaj membrokategorioj kaj oni membriĝos en ĝi kontraŭ jara kotizo de 100,- gld. aldone al la membro-kotizo en alia kutima membrokategorio.

Krom la menciita administra simpligo, ekde 1977 ŝanĝiĝos la Ĝenerala Regularo de UEA por rekoni la novan kotizsistemon kaj ekz. permesi, ke komitatanoj kaj delegitoj rajtu esti personoj, kiuj estas dum difinita periodo MJ (Membro kun Jarlibro) kaj en iu maniero ricevas ankaŭ la revuon *Esperanto*, ĉu kiel membro-abonantoj, kiel simplaj abonantoj aŭ kiel kolektivaj abonantoj pere de siaj landaj asocioj.

Lige al la nova kotizsistemo, la Estraro decidis inviti pliajn landajn asociojn konsideri eblecojn de kolektiva asocia abono de la revuo *Esperanto*, simile al la jam funkciantaj aranĝoj por Belgio kaj Pollando. Estas kun intereso notite, ke pliaj landoj (Aŭstralio, Svislando, Italio) petis informojn pri kolektivaj abonoj de la revuo.

## Aliaj temoj kaj decidoj

Diskutinte la nunan staton kaj evoluon de Institucio Hodler 68, oni decidis nomi du pliajn membrojn en la estraro de la Institucio: s-roj E.L.M. Wensing kaj E.J. Woessink.

En pluraj vesperaj kunsidoj la Estraro traktis ĉiujn detalojn de la kongresa programo por la 61a UK en Ateno. Multaj el la faritaj decidoj aperas en ĉi tiu numero en la escepte ampleksa Kongresa Komunikado. Necesas tamen aldoni, ke estas decidite en Ateno okazigi apartan komitatkunsidon kiu traktos novan version de la antaŭprojekto de nova Statuto de UEA.

Iom da tempo forrabis ankaŭ diskutoj pri la aktiveco de kelkaj unuopuloj kaj grupoj, kiuj kontraŭagas la pozitivajn klopodojn de la Asocio. Krom la aparta deklaro, kiun vi trovas ĉi-apude, estas decidite plue eviti polemikadon kaj anstataŭe " respondi " per elstarigo de la rezultoj en la aktiveco de UEA. Ekzemple: ĉu necesas plia aŭ pli bona reago al ĉiuj akuzoj pri la financa politiko de la nuna Estraro de UEA, ol estas la aperigo de la rezultoj, kiuj montras financan profiton en la pasinta jaro?

Dum la lastaj du jaroj multaj membroj de UEA en la landoj kun transpagaj problemoj ne povis ĝui membrecon en UEA pere de la Fondaĵo Canuto. Estis multjara kutimo, ke tiu fondaĵo ricevu subtenon el la Propaganda Konto de UEA. Tamen, pro la fakto, ke la Propaganda Konto estis malplena — ĉefe pro manko de finkalkulo de la 58a UK — tiu subvencio ne eblis en 1974, nek en 1975. La Estraro decidis ĉi-jare subvencii la Fondaĵon Canuto per la sumo de 5 000 gld., kio egalas al 100 kotizoj de Membro-Abonanto.

Laste, la Estraro faris formalan decidon esplori eblecojn, ke la Centra Oficejo translokiĝu el Rotterdama al Bruselo. Kompreneble, la translokiĝo mem — se ĝi foje okazos — estas ankoraŭ afero de eble eĉ malproksima estonteco.

## Deklaro

La Estraro de UEA konstatas, ke aperis en la Esperanto-movado pluraj cirkuleroj kaj aliaj skribaĵoj, kiuj enhavas senbazajn akuzojn kontraŭ UEA kaj atakojn kontraŭ kelkaj ĝiaj membroj. La fakto, ke la Estraro ne respondas al tiuj asertoj, neniel implicas, ke ili enhavas ian ajn veron. La Estraro ne deziras foruzi tempon je polemikado, ĉar ĝi okupiĝas pri pozitiva laboro por Esperanto kaj fidas je la kapablo de la membraro de UEA juĝi la veron interalie per la oficialaj eldonaĵoj de UEA, pri kiuj la Estraro akceptas plenan respondecon.

1976 04 12

Estraro de UEA

# Ekaperas „Scienca mondo”

La plej granda tutmonda profesia organizaĵo de la sciencistoj enkondukas Esperanton en sian oficialan revuon, kiu ekde marto ĉi-jare komencis aperi sub la titolo ”Scienca mondo”. Kvankam pluraj detaloj pri la nova periodaĵo ankoraŭ ne estas al ni konataj, ni publikigas la tekston de prof. Ĝuĝev esperante, ke pliaj informoj atingos nin intertempe. Tre verŝajne ankaŭ UEA peros abonojn al ”Scienca mondo”, pri kio ni esperas publikigi detalojn en unu el la proksimaj numeroj de nia revuo.

LA MONDA Federacio de la Sciencaj Laboristoj (MFSL) unuigas 33 naciajn asociojn el 29 landoj kun pli ol 300 000 membroj kaj kun multaj membroj-korespondantoj en aliaj 28 landoj. Ĝi estas fondita en 1946 laŭ iniciato de la mondfamaj sciencistoj: profesoroj Frédéric Joliot-Curie kaj Paul Langevin el Francujo, John Bernal kaj Cecil Powell el Britujo — ĉiuj laŭreatoj de Nobel-premioj. Ĝia unua prezidanto, ĝis sia forpaso, estis Frédéric Joliot-Curie. Hodiaŭ la funkcion de prezidanto de la Federacio plenumas la fama angla sciencisto prof. Eric Burhop, laŭreato de Nobel-premio, kaj la funkcion de vicprezidantoj: I.I. Artobolevski (Sovet-unio), akademiano Kiril Bratanov (Bulgarujo), prof. K. Witzberger (Germana Demokratia Respubliko) kaj d-ro Husain Zahir, forpasinta en januaro 1976 (Hinda Unio). Ĝenerala sekretario estas prof. Pierre Briquard (Francujo).



Prof. Vasil Peevski (Bulgario), vicprezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, ludis aparte elstaran rolon en la klopodoj eldonigi la revuon ”Scienca mondo” ankaŭ en la Internacia Lingvo.

MFSL ricevis de Unesko statuson de konsulta organizaĵo en la kategorio A. Tre malmultaj organizaĵoj posedas tian statuson. Depost kelkaj jaroj la reprezentantoj de la Federacio partoprenas kiel aktivaj membroj en la internacia komisiono de la neregistraraj organizaĵoj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj por la problemoj de la malmarmado en Ĝenevo. En la nuna danĝera epoko por la homaro, MFSL unuigas la penadojn de la intelektuloj el la tuta mondo por sekurigi la pacon, kulturan

kaj ekonomian kunlaboradon inter ĉiuj popoloj de nia planedo. Pro sia pacifista karaktero kaj agado ĝi ĝuas grandan internacian aŭtoritaton kaj prestiĝon. La oficialaj lingvoj, en kiuj la Federacio aperigas sian presorganon kaj siajn dokumentojn, estas kvar: angla, franca, germana kaj rusa. En sia lasta kunsido la Plenuma Konsilio de la Federacio decidis adopti Esperanton kiel kvinan lingvon por sia presorgano kaj komisiis al la Asocio de la sciencaj laboristoj en Bulgarujo la taskon pri ĝia aperigo. Tio ĉi estas preskaŭ oficiala rekono de la Internacia Lingvo fare de tiom alta scienca instanco. Ĝi certe havos reefikon sur aliajn sciencajn unuiĝojn kaj sociajn movadojn. Sed pli grava ankoraŭ estas la enpenetro kaj la enradikiĝo de Esperanto ĉiam pli kaj pli profunden en la vivo de la scienco, en la praktika profesia laboro kaj en la internacia kunlaborado de la sciencistoj. Tiamaniere nia lingvo komencas gajni terenon en gravaj sociaj tavoloj, trude de **malsupre**, malgraŭ la paŭtado de la oficialaj (ŝtataj) instancoj . . . Tio ĉi estas la vojo al la venko.

Akceptinte la komisiitan taskon, la Prezidio de la Bulgara Asocio de la sciencistoj asignis la necesan subvencion por la eldonelspezoj. La revuo aperados kvarfoje en la jaro sur 32 paĝoj. Ĝi enhavos artikolojn kaj komunikojn de mondfamaj sciencistoj, kiuj sian materialon ne pritraktos el mallarĝe faka vidpunkto, sed popularscience okupiĝos pri ĝeneralaj kaj aktualaj problemoj de komuna intereso. La statuto de la Federacio difinas la ĝeneralan linion de ĝia presorgano. La jara abonkoto de la Esperanta eldono de *Scienca mondo* estas unu (1) usona dolaro por la okcidentaj landoj, kaj unu (1) soveta rublo aŭ bulgara levo por la orienteŭropaj landoj. Tiun ĉi ridinde malaltan prezon ebligis la subvencio de la Bulgara Asocio de la Sciencistoj, kies prezidanto, akademiano K. Bratanov, vicprezidanto de la Federacio, aktive favoras Esperanton.

La adopto de Esperanto fare de MFSL malfermas novan paĝon en la historio de nia Movado. La esperantistoj devas fari ĉion, kio dependas de ili, por disvastigi la revuon en sciencaj kaj aliaj intelektaj, ankaŭ neesperantistaj rondoj.

La sciencistoj donis la ekzemplon. Nun estas la vico de la aliaj grandaj profesiaj organizaĵoj.

Prof. d-ro St. Ĝuĝev



Enteriga ceremonio de Kolomano Kalocsay: Parolas akademiano Ivo Rotkvić (maldekstre) kaj d-ro József Mátéffy (dekstre), prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio, kies Honora Prezidanto estis Kalocsay.

ENTERIGO DE KÁLMÁN KALOCSAY:

# Li apartenis al la „titana gento”

La enteriga ceremonio de la forpasinta d-ro Kalocsay okazis la 25an de marto 1976 en la malgranda vilaĝo Máriabesenyő apud Budapeŝto. En la modesta funebra solenaĵo, kiun ĉeestis kelkaj centoj da homoj, nome de UEA parolis akademiano Ivo Rotkvić el Zagreb (Jugoslavio). Ni aperigas la kompletan tekston de tiu parolado.

LA KORDO abrupte rompiĝis kaj fale forglitis la svenaj fingroj de la magia harpisto Kolomano Kalocsay . . .

Nun li ripozas en sia lasta haveno antaŭ ol transpasi, senrevne, la limponton inter la efemereco, kiun li forlasas, kaj la senmorteco, al kiu lin gvidas la stelbrila vojo de lia genio.

Kolomano Kalocsay ĉesis vivi, sed la Morto ne triumfos supervenke. Postrestis el li multo nedetruibla!

La grandiozecon de la staturo de Kalocsay, pro la troa proksimeco, ankoraŭ ne estas eble elmezuri, kvankam ni jam nun povas, birdvide, konstati, ke li apartenis al la "titana gento" en nia movado. Ankaŭ liajn verkojn ni ne sukcesus, laŭvalore, difini eĉ per plej larĝa formulo, ĉar ili formas unu tutan literaturan kosmon kun la propraj leĝoj de gravito kaj apartaj astraj konstelacioj.

Kalocsay estis fenomeno, kia disbrilas nur unufoje en ĉiu jarcento.

Forpasis pli ol kvin jardekoj, de kiam Kalocsay aperis sur la Esperanta mondsceeno. Sub la arĉotiro de la nova, originala, poeto la lingvo eksonorilis vortabunde, kolorriĉe, kvazaŭ polifonia orkestro. Vere, grava kontribuo de Kalocsay al la stiloturno de la originala Esperanta poezio.

Tiun sian epokofaran paŝon li poste prirememoros en simpla konfeso: "Kaj se en mia koro estis ardo, ĝi estis por la lingvo: mi ĝin volis prepari, perfektigi por genio post mi venonta."

Eble ĝuste tiu korardo por lingva perfektigo forturnis la originalan poeton de la ekpaŝita vojo. Liaj originalaj poemoj estas pli kaj pli malmultaj, plej ofte nur introspekta rifuĝo el la tedo de ĉiutago en la senvelkan boskon de poezio. Nun li dediĉas sian neelĉerpeblan genion, laŭ la zamenhofa ekzemplo, al la tradukarto. Kaj pri ĝi neniue en la Esperanta literaturo estas inda rivalo al li.

Luktante en la senĉese drameca batalo por venkotrude enkapti spitan, elfuĝeman esprimon de originalo en la traduke adekvatan impreson kaj koncizon, Kalocsay

fine triumfas kiel nesuperebla majstro eĉ pri la plej subtila lingva nuanco.

Tial la tradukoj de Kalocsay atingis zenitan altecon. Ili ne estas nura traduka anekso de mondaj ĉefverkoj en Esperanton, ili estas geniaj reverkoj, maturaj por pruvi, ke la literaturaj belecoj estas senmortaj, ke ili tra jarcentoj kaj jarcentoj, eĉ tra apokalipsaj plagoj, travojas en sia senmakula brilo.

Tra generacioj tiuj ĉi tradukoj fajreretos en nia literaturo kiel juveloj, inkrustitaj en reĝaj kronoj.

Ni ne povas forgesi ankaŭ unu el la plej mirindaj trajtoj de Kalocsay, ke li neniam estis memcentra kaj memsufiĉa verkisto. En lia alnaskita kunlaboremo ekfloris la neforgesebla parcelo de belo: "Literatura Mondo". Leonparte ĝi estis lia iniciato kaj dank' al ĝi Budapeŝto ekrolis kiel "Verda Ateno" de esperantistoj, en kiu, ĉirkaŭ la genuoj de du grandaj majstroj, Baghy kaj Kalocsay, ariĝis disĉiploj de la fama "Budapeŝta Skolo".

Tiel la agado de Kalocsay seninterrompe disvolviĝas inter poetaj vizioj, tradukaj cizeladoj kaj atentaj priobservoj de la lingvo-evoluo. Por fidele protekti la lingvan tradicion li, batalprete, tenas kiel ŝildon la Fundamenton. Al la poetaj vizioj kaj tradukistaj spertoj ni dankas liajn verkojn pri la stila majstreco kaj la bazaj leĝoj de poetiko. El liaj observoj pri la lingvo-evoluo rezultas pluraj lingvistikaj traktatoj. Lia deira starpunkto: Esperanto ne estas ia lingva pro-



Unu el la lastaj konataj fotografaĵoj de Kalocsay (Foto de Zoltán Fejér al kiu apartenas ankaŭ la aliaj ĉi-kunaj fotoj)



Ankaŭ la homa perdo estas granda: La plej proksimaj familianoj (edzino kaj filino) dum la funebra solenaĵo.

jekto aŭ "artefarita lingvo", ĝi jam delonge elriveris en "la plej junan membron de la hindo-eŭropa familio." Tial liaj lingvistikaj verserĉoj, liberiginte el la rutinaj pensosulkoj, enhavas tre originalajn analizojn kaj el lia sorĉista "retorto" elŝutiĝas kristale klaraj rezultoj.

Se Kalocsay ne havus aliajn meritojn, se postrestus nur liaj lingvaj plukonstruoj sur la granita zamenhofa Fundamento kaj la argumentoj, elkribritaj, en ora ŝuto, el la verkoj de Zamenhof kaj de la plej elstaraj esperantistaj verkistoj, Kalocsay levus por sia gloro piramide superstaran monumenton.

Resume kaj kernovorte:

Kalocsay dum sia tuta vivo estis unu el tiuj superaj animoj, dotitaj per genio kaj majesta homeco, li estis homo plena de interna lumo, la homo profunda kaj neforviŝebla el la ora paĝo de la esperanta historio.

En la nomo de la Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas al la familio Kalocsay kaj samtempe esprimas profundan dankon de la tutmonda esperantistaro pro ĉio, kion la familio oferis por faciligi al nia neforgesebla grandulo la poresperantan laboron;

En la nomo de la Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas al la tuta hungara esperantistaro pro la perdo de la plej eminenta avangardulo;

En la nomo de la Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas al la tuta hungara popolo pro la perdo de unu el ĝiaj grandaj filoj.

Estis iam Kolomano Kalocsay — diras nun la ŝtona ĉizo. Li pasis, ve li pasis, sed restis lia Ago!

Ivo Rotkvić

# Strategion, ne nur taktikon

Ĝis kiu grado la ĉi tie esprimitaj opinioj de d-ro Szerdahelyi estas ĝustaj, — pri tio juĝu la legantoj mem. Ni decidiĝis publikigi la sekvantan tekston, ĉefe pro la demandoj, kiujn ĝi starigas, kaj ne pro la solvoj, kiujn ĝi aludas, nek pro la ekzemploj, kiujn ĝi elstarigas.

POST HAMBURGO aperis jam kelkaj artikoloj, eĉ monografio. Sed iliaj aŭtoroj estis ĉiuj engaĝiĝintoj kaj ĝuste tial ili ne povis liberiĝi de certaj subjektivaj impresoj. Kvankam nur la tempopaso demonstros la signifon de la Hamburga Kongreso en la serio de UKoj, oni jam nun povas formuli kelkajn konkludojn.

La eksterulon (kaj ĝuste tial: objektivan observanton) ne tiom interesas **la personaj ŝanĝoj**, kiomgrade tion la tuŝitoj pensas. Por la granda publiko tiuj nomoj fakte ne multe signifas, eĉ se ili estas (ĉar estas) elstaraj. Se oni demandus iun simplan soldaton de la verda armeo, kiuj estas la estraranoj de UEA, ŝajne eĉ ne 0,5% el inter ili povus senerare kaj senmanke elnombri ilin (mi honte konfesas: eĉ mi mem). La kaŭzo estas, ke UEA ne estas operacia sed reprezenta organo: ĝi simbolas la universalan unuecon de esperantistoj.

La hamburgaj eventoj okazis ne pro personaj, kaj tute ne pro politikaj kialoj: la interna evoluo de la movado eksplodigis ilin.

En la lasta tempo, paralele kun la (formale) organizita movado elformiĝis ia alia "nemovada" movado, havanta la saman celon kiel la organizita, sed aganta en alia medio, per aliaj rimedoj.

**La organizita movado** sekvas la tradicion kontinuan, principe la izolitecan politikon. Ĝia fina celo estas la sukcesigo de la afero kaj la rimedoj estas: la altigo de membro-nombro, certigo de internaciaj kontaktoj (literaturo, gazetaro, korespondado, renkontiĝoj, kluboj, kongresoj ktp.), establi ekster la organizita mondo siaspecan apartan soci-modelon (kun flago, himno, personaj kultoj ktp.), flegi la purecon de la lingvouzo k.s.

Laŭ tiu koncepto, la difino de "esperantisto" restis la sama, kiel ĝi estis formulita antaŭ 70 jaroj: ĉiu kiu scipovas kaj uzas Esperanton, sendepende de formo kaj celo. Tipa organo de tiu movado estas la **Akademio de Esperanto**, havanta nenian rilaton al aliaj akademioj, naciaj aŭ internaciaj sciencaj institutoj, rekonita de neniun scienca instanco. En si mem ĝi estas fiktiva organizaĵo loke nefiksebla, kaj ĝia aktiveco estas nesentebila, nevidebla (krom kelkaj decidoj, koncernantaj la lingvouzadon). Ĝi eldonis ĝis nun nek norman vortaron, nek norman lingvopriskribon, pretigis neniun bazan dokumenton de la lingvo. Ĝi havas nenian rilaton kun la institucioj, kie oni okupiĝas pri la scienca esploro de la internacia lingvo; ĝi eldonis ĝis nun nenian sciencon lingvopriskribon por la lingvistoj,

kiuj jam ege dezirus ekkoni Esperanton, ne ellerni ĝin, pro pure sciencesploraj kaŭzoj. La aktiveco de la Akademio limiĝas al la parolflegado, ĝusta uzado de la lingvo — agado tre nobla, sed ne sufiĉa. (Tiu koncepto evidentiĝas ankaŭ el la konsisto de akademianoj kaj el la pluraj deklaroj de la prezidanto, laŭ kiuj: oni ne bezonas sciencistojn, tute ne lingvistojn, sed "bonajn esperantistojn".) En la statuto troviĝas kvazaŭ ĵura postulo pri la fidindeco al la Fundamento (sektema elemento) kaj prefero al la t.n. "grandaj kultur-lingvanoj", honte diskriminacia tezo kontraŭ multiloj da aliaj lingvanoj.

**La nemovada (ekster-Esperantuja) movado** konsistas el diverstipaj iniciataĵoj, kiuj funkcias ne interne de la organizita Esperanto-movado sed en la establita mondo. Ni menciuj kelkajn (mi povis listigi nur tiujn, kiujn mi konas. Mi esperas, ke ekzistas ankoraŭ multaj aliaj similaj):

- La interlingvistika sekcio de la Soveta Scienca Akademio (M. Isaev);
- La instru-kibernetika instituto, Paderborn (H. Frank);
- La universitataj fakoj, katedroj, lektoratoj;
- Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (C. Gocond);
- Internacia Kultura Servo, Zagreb (Z. Tišljari);
- Kvinlanda Kunordiga Centro, Maribor (P. Zlatnar, F. Vetrih, J. Zadavec);



Prof. d-ro I. Szerdahelyi: "Rekoni la postulojn de la tempo, analizi kaj esplori ilin kaj trovi la ĝustan strategion".

- Esperanto à l'Ecole, Mont-Soleil (O. Tzaut);
- Centra Laborrondo, Berlino (D. Blanke);
- Someraj Universitataj Kursoj, Liège (U.J. Moritz, A. Heck);

- Interlingvistika Informa Servo (A. Bormann);

Fokuso (E. Vilborg) k.a.

Tiuj organoj ankaŭ estas "esperantistaj", sed jam en aliaj sencoj de la vorto: Esperantisto estas konsiderata tiu, kiu:

a) opinias, ke la problemo de lingvokonfuzo estas serioza socia problemo;

b) estas konvinkita, ke tiu problemo estas solvebla kaj nepre solvenda;

c) estas konvinkita, ke la plej taŭga solvo estas la internacia lingvo Esperanto;

ĉ) konscias, ke la definitiva solvo de la problemo efektiviĝos tra la sciencistoj fare de politikistoj;

d) konscias, ke konvinki la sciencistojn kaj politikistojn oni povas nur per seriozaj argumentoj kaj pripensitaj dokumentoj;

e) opinias, ke ĝuste tial: Esperanto ne plu povas resti privata afero de esperantistoj, nek nobla ludo kaj amuzo de unuopuloj, sed serioza kultura fenomeno kaj sekve:

f) klopodas ĉiumaniere seriozigi, emancipi, finfine oficialigi ĝin.

**Revenante al Hamburgo:** Se tiu kongreso estis la konsciigo pri la ekzisto de tiuj du tendencoj, la konsciigo pri tio, ke nek la organizita, nek la neorganizita movado povas realigi la celon unu sen la alia kaj tiu konsciigo kondukos al la integriĝo de la du tendencoj — tiam Hamburgo plenumis sian historian mision kaj signos mejloŝtonon en la movada historio.

Sed, se krom la personaj ŝanĝoj ŝanĝiĝos nenio, tiam kaj la movadaj kaj la ekstermovadaj organizaĵoj daŭrigos sian sizifan\* laboron. La organizita movado restos tia, kia ĝi estis ĝis nun, ĉar ne la nomlisto de ĝiaj estraroj determinas la profilon de ĝia aktiveco, sed la soci-politikaj kaj historiaj kondiĉoj. La nova estraro restante inter la samaj kadroj, esence kapablos ŝanĝi nenion, kaj — pro la forta tradicia efiko — ili mem rimarkos, ke ne ili ŝanĝis ion, sed ilin ŝanĝis la cirkonstancoj. Rekoni la postulojn de la tempo, analizi kaj esplori ilin kaj trovi la ĝustan strategion: tio povas (kaj mia opinio devas) esti nun la tasko de ĉiu esperantisto, kiu kun plena morala konscio entreprenis gvidi la movadon kaj efektiviĝi ĝiajn celojn..

D-ro I. Szerdahelyi,  
Universitato, Budapeŝto

\* Sizifo (Sisyphus, v. *PIV*, p.997): "reĝo-rabisto, kondamnita al la Inferoj ruli ĝis la supro de (kruta) monto rokon, kiu senfine retroruliĝis de tiu supro". Sizifa: pena, superflua, senrezulta.

**Rimarko:** Mi intence ne tuŝis la "ideologian" diskuton, ĉar ĝi estas tiom infanece-groteska, ke niaj posteuloj, legante ĝin, apenaŭ povos kredi, ke iliaj antaŭuloj estis tiel naivaj.

## LINGVOJ KAJ LA DUCENTJARA JUBILEO:

# „Lingva banko”

PLURAJ INSTANCOJ, kiuj entreprenas preparlaborojn por la turisma invado de Usono okaze de ĝia ducentjara jubileo, komencis okupiĝi ankaŭ pri la lingvaj baroj. Sian maltrankvilon pri tiu aspekto de la jubileo esprimis jam la direktoroj de pluraj malsanulejoj en la ĉirkaŭaĵo de Vaŝingtono, kiel ankaŭ Joseph Yeldell, la direktoro de la Departemento de Homfortoj de Vaŝingtono. La t.n. Konsilo pri Servoj al Eskterlandaj Vizitantoj — finance privata entrepreno — preparas sin por proponi tradukservojn laŭbezono. Ankaŭ la t.n. Lingva Banko de la Usona Asocio de Universitataninoj serĉas dulingvajn volontulinojn por interpreti la ĉefajn fremdajn lingvojn. Tiu "banko" havas la celon solvi la lingvajn problemojn de malsanulejoj, aerhavenoj, fervojaj kaj aŭtobusaj stacioj, lernejoj, hoteloj kaj aliaj institucioj, kiuj devas trakti kun ne-anglalingvanoj. Kiel en pluraj similaj kazoj, oni simple konfesas, ke la lingva problemo montriĝas escepte grava kaj ĝena; oni silente allasas, ke la lernado de la fremdaj lingvoj eĉ ne mildigas la problemon. Por la festa okazo, oni klopodas solvi la problemon per lingva piroteknikaĵo.

## TRADUKOJ:

# Revua ponto-lingvo

EN NIA JANUARA NUMERO (p.13), D.B. Gregor prezentis lastatempajn tradukojn por kiuj Esperanto servis kiel ponto-lingvo. Tiun rolon de Esperanto oni atente sekvas (v. ankaŭ *Esperanto en perspektivo*, p.245-248), sed okazas ne tiel malofte, ke oni "malkovras" tian tradukon aperintan antaŭ jaroj. Necesus atenti, ke CED havas apartan sliparon por ponto-tradukoj kaj, ke estas bonvene sendi informojn pri tia eldonaĵo al la CO de UEA, prefere kun ekzemplero de la eldonaĵo por la Biblioteko Hodler. Tamen, ponto-tradukoj aperas ankaŭ en formo de unuopaj literaturaĵoj, tradukitaj por diversaj literaturaj gazetoj kaj revuoj. Viglan aktivecon tiurilate praktikas s-ro Nazzareno Caruana el Malto (163/165 Triq Sant'Anglu, Zejtun), kiu jam publikigis tutan dudekon da diverslingvaj literaturaĵoj, ĉiuj tradukitaj el Esperanto en la maltan lingvon. Temas fakte ĉefe pri eseoj, kiuj traktas naciajn literaturojn aŭ unuopajn verkistojn. En unu el siaj lastatempaj leteroj al ni, s-ro Caruana plendas pri manko de taŭga tradukmaterialo kaj i.a. diras: "Mi ankoraŭ ne publikigis tradukojn pri la literaturoj de Islando, Norvegujo, Svedujo, Danlando, Finnlando, Hinda Unio, Afriko, arabaj landoj, Brazilo, Koreo kaj Japanujo." Eblus do helpi lian agadon per alsendo de konvena tradukmaterialo.

# Ĉu ĉiam samaj kongresanoj?

## Kie oni dezirus kongresi?

POST LA UNUA RAPORTO pri la enketo (v. nian januaran numeron, p.12), alvenis kelkaj pliaj respondoj, tiel ke entute respondis 245 personoj, el kio precize 100 estas virinoj. La prilaboro de la enketiloj donis multajn interesajn respondojn kaj rimarkojn, sed pluraj el ili ĉefe valoras kiel vojmontrilo por la estontaj organizantoj de la kongresoj (ekz. opinioj pri la akcepta servo, taŭgeco de kongresejoj kaj diversaj eroj de la kongresa programo). Ni ĉi tie resumas nur tiujn rezultojn de la enketo, kiuj malkovras aŭ emfazas iujn pli ĝeneralajn trajtojn aŭ iujn apartajn interesaĵojn de la Universalaj Kongresoj.

### Bona gajno por hotelistoj

Nur 9 enketitoj konstante loĝas en Kopenhago aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo, ĉiuj aliaj 236 respondintaj kongresanoj estis do gastoj en la dana ĉefurbo kaj pasigis sume 1932 noktojn en kopenhagaj hoteloj, t.e. meze 8 tranoktoj por ĉiu kongresano. Se la enketilojn resendis nur iom malpli ol kvarono de la kongresanoj, kalkulante, ke ankaŭ la restintaj tri kvaronoj devis ie loĝi dum la kongresa semajno, ne estas malfacile konkludi, ke la kopenhagaj hotelistoj profitis minimume 6-7 000 tranoktojn. Tio estas granda turisma kuko por ĉiu vojaĝagentejo, des pli, ke la tutan varblaboron ne faras turismaj agentejoj, sed la kutima esperantista kongresa aparato.

### Multaj novuloj inter la kongresanoj

Ne malofte oni aŭdas asertojn, ke al la Universalaj Kongresoj venas ĉiam la samaj homoj. La kopenhaga enketo, tamen, komplete neas tiajn opiniojn, ĉar duono de la enketitoj estis antaŭe malpli ol 3 fojojn en la kongresoj, kaj por 39 (el 245) respondintoj, la 60a UK estis la unua Universala Kongreso, kiun ili partoprenis. Tamen, 16 enketitoj estis por la 10a fojo en UK, 5 por la 15a, kaj 5 enketitoj vizitis jam 20 aŭ pli da Universalaj Kongresoj. Tri el la enketitaj kongresanoj respondis, ke ilia unua UK estis la 13a en Prago (1921); 9 veteranoj vizitis UK antaŭ la jaro 1930, dekkvin unuafoje kongresis inter 1930 kaj 1939, sepdek inter 1947 kaj 1960, sesdek sep tion

faris en la jaroj 1961-1970, dum fine, 84 (34%) enketitoj unuafoje vizitis UK en la lastaj kvin jaroj.

### Kiujn kongresojn oni konsideras memorindaj

Demandite kiujn Universalajn Kongresojn oni konsideras memorindaj kaj kial, la enketitoj per siaj respondoj faris interesan rangliston, ĉe kies pinto staras la 60a UK en Kopenhago kun 32 voĉoj; sekvas 1974 Hamburgo (20 voĉoj), 1966 Budapeŝto (18), 1965 Tokio (16), 1969 Helsinki (14), 1970 Vieno (14), 1963 Sofio (11), 1959 Varsovio (9) ktp. Evidente, freŝaj memoroj pri la lastatempaj kongresoj ludas gravan rolon, sed oni longe memoras ankaŭ kelkajn aliajn kongresojn, kiuj okazis antaŭ deko aŭ dudeko da jaroj. La kopenhaga kongreso meritis sian lokon pro la harmonia etoso, la hamburga pro bona organizo kaj tre taŭga kongresejo, la budapeŝta kaj varsovia kongresoj impresis antaŭ ĉio per la nombro de la partoprenintoj kaj ĝia influo al la internacieco de la aranĝo; la kongreso en Tokio gajnis sian altan lokon en la listo ĉefe per la afableco de la japanaj esperantistoj. Inter la respondoj al tiu ĉi demando ne mankas ankaŭ tute alispecaj kialoj por memorindeco de iu antaŭa UK, ekz. beleco de la kongresa urbo, la plej bona akcepto en la urbodomo, amikiĝo kun sia posta edz(in)o ktp. Ĝenerale, la enketitoj donas apartan atenton al la jenaj aspektoj de la kongresoj: komforta kongresejo, ne tro multekosta loĝado, ne tro ŝargita kongresa programo, belaj kaj interesaj vesperaj programeroj, multnombra aliĝado ktp.

### Universalaj Kongresoj en la sekvantaj jaroj

96 kopenhagaj enketitoj respondis pozitive al la demando ĉu ili intencas veni al la 61a UK en Ateno, 38 respondis per "eble", kaj 105 donis negativan respondon al la demando. Al la sama demando, sed rilate la 62an UK en Rejkjaviko, 111 personoj respondis jese, 70 per "eble" kaj 55 diris, ke ili ne intencas veni al la kongreso en Islando.

Aparte interesa montriĝis la sondado pri la elekto de estontaj kongresaj landoj. Ĉe la pinto staras Francio (50 voĉoj) kaj sekvas: Italio (48), Bulgario (36), Soveta Unio (35), Svislando (34), Pollando (27), Brazilo (23), Svedio (20), Ĉeĥoslovakio (17), Aŭstrio (16) kaj .... longa listo de aliaj landoj, inter kiuj aperas Israelo (kun 14 voĉoj), Ĉinio (13), Britio (13), Nederlando (9), Aŭstralio (8), Germanio (8), Kanado (6), Kubo (4), Nov-Zelando (3), Usono (3), Luksemburgo (2), Madagaskaro (1) k.s.

Al rekta demando pri eventuala kongreso en Sud-Ameriko aŭ Afriko, 50% respondis nee pri la ideo mem de Universala Kongreso en tiuj mondpartoj, dum nur kvarono de la demanditoj pozitive konsideris sian partoprenon en sudamerika aŭ afrika kongreso.

La prilaboro de la enketfolioj ankoraŭ daŭras, kaj pliaj rezultoj eventuale aperos en postaj numeroj de nia revuo. La enketon analizas s-ro E.L.M. Wensing, ĝenerala sekretario de UEA.

**Redaktas: Germain Pirlot, Kemmelbergstr.  
5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio.**

## Revivigo

LERNEJA BULTENO ne estas nova rubriko en nia revuo. Ĝi ekzistis dum multaj jaroj sub tiu sama aŭ alia nomo. Ial, dum kelkaj lastaj jaroj malaperis el la revuo almenaŭ tiu rubrikotitolo, kvankam oni tion ne povus diri pri materialoj, kiuj traktis lerneajn temojn. Tiaj materialoj regule aperis, kaj informoj pri novaj kursoj aŭ aliaj atingoj en la instruado de la Internacia Lingvo ofte estis prioritare traktataj en ĉi tiu revuo. Ne temas do pri kreo de nova, sed simple pri revivigo de la malnova rubriko. Ĝi celas aperigi prefere mal-longajn informojn pri la Esperanto-instruado. Ĉar unu el la grandaj celoj de la tuta Esperanto-movado restas la oficiala enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn, por atingi ĝin necesas kunlaboro kaj daŭra interŝanĝado de informoj pri la agadoj kaj atingoj sur la lerneja kampo. Se ĉi tiu rubriko fariĝos interŝanĝejo de spertoj kaj ideoj, niaj komunaj klopodoj sur la lerneja kampo estos pli sukcesaj kaj nia agado pli celtrafa.

Kvankam malantaŭ ĉi tiu rubriko staras la Konsulta Komisiono pri Edukado, kiun la Komitato de UEA fondis dum la 60a UK — tiel oni klopodis ŝtopi la breĉon, kiun estigis klopodoj komplete bloki pluan kunlaboron inter ILEI kaj UEA — la rubriko restas malferma al ĉiuj, kondiĉe ke ili deziras antaŭenigi la instruadon de la Internacia Lingvo. La redaktoro de la rubriko kun scivolo atendas informojn kaj aliajn kontribuojn pri la aktivecoj sur la lerneja kampo. Intertempe, jen kelkaj tiaspecaj novaĵoj:

### La ĉi-jara ILEI-konferenco

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) havos ĉi-jare gravan konferencon en la miniatura respubliko San Marino, kiun ĉirkaŭas Italio. Dum tiu konferenco, okazonta inter la 23a kaj 29a de julio 1976, kunvenos ankaŭ la asembleo de ILEI, kiu estas la plej alta decidorgano de la faka instruista organizaĵo. Supozeble, la asembleo diskutos ankaŭ pri la estontaj rilatoj inter ILEI kaj UEA. Pliajn informojn pri la ILEI-konferenco, kiu do okazos en la semajno antaŭ la Universala Kongreso en Ateno, vi povas peti de la ĝenerala sekretario de ILEI: D-ro Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C., Italio.

### Komisiono pri lingvaj problemoj

Eŭropa Asocio de Instruistoj (EAI) decidis starigi 6-personan komisionon, kiu traktos la eŭropan lingvo-problemon. La komisiono konsistos el tri membroj de EAI kaj el tri esperantistoj. Kvankam ni nur poste

raportos pri la laboroj de tiu komisiono, jam nun necesas forte rekomendi, ke ĉiu agema instruisto nepre aliĝu al sialanda sekcio de EAI, por plifortigi la esperantistan influon en tiu asocio, kiu havas ĉ. 30 000 membrojn kaj sekciojn en Aŭstrio, Belgio, Britio, Danlando, Francio, FR Germanio, Greklando, Irlando, Italio, Luksemburgo, Malto, Nederlando kaj Svislando. Pri la adresoj de tiuj landaj sekcioj vi povas turni vin (aldonante respondkuponon) al: S-ro Serge Moser, ĝen. sekretario de AEDE, 122, rue de Lausanne, CH-1202 Genève, Svislando (skribante nacilingve) aŭ al: S-ro Germain Pirlot, Kemmelbergstr. 5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio (skribante, kompreneble, en Esperanto).

### Internacia regiona organizaĵo fondita

Unu el la plej konkretaj paŝoj rezulte de la Unua Pacifika Kongreso de Esperanto en Melburno (v. nian februaron n-ran, p. 27) estis la starigo de la Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto (PAPIE). Tiu asocio servos kiel nacia organizaĵo por la Esperanto-instruistoj en Aŭstralio, kaj ankaŭ kiel kunligilo por la aliaj naciaj instruistaj asocioj de la pacifikaj landoj; ĝi aparte vartos kontaktojn kun izolitaj instruistoj en landoj kie faka instruista E-organizaĵo ne ekzistas. PAPIE planas eldoni gazeton *Transoceana*, kiu aperos kvarfoje jare. Pro enkongresa kaj tujposta agado, PAPIE kolektis 28 membrojn el 6 landoj. La prezidanto de PAPIE estas s-ro Trevor Steele, 3 Woodridge Street, Moorooka 4105, Aŭstralio.

### Helpo al specialigita lernejo

Unuagrada lernejo por nevidantoj kaj ambliopuloj, kiu ĵus enkondukis Esperanto-instruadon, deziras ricevi informojn pri didaktiko kaj novaj lerniloj kaj adresojn de lernejoj kie oni havas similan instruadon. La celo estas starigi rektan kontakton kaj eventuale interŝanĝi spertojn kaj organizi renkontiĝojn. Adreso: Scuola Elementare Statale, Istituto dei Ciechi, Via Nicolodi 100, I-09100 Cagliari, Italio. Tiuj, kiuj povos helpi ĉi tiun lernejon, bv. informi pri tio ankaŭ la redaktoron de ĉi tiu rubriko, kiu povus utiligi la informojn ankaŭ en estontaj similaj kazoj.

### Novzelanda eksperimento plivastiĝas

La eksperimentaj klasoj en novzelandaj mezlernejoj (v. nian revuon, marto 1975, p. 48) atingis la finon de la unua lernojararo. Fine de 1975 — en novzelandoj koincidas la lerneja kaj la kalendara jaroj —, la Eduka Ministerio subvenciis unutagan rezulto-taksan kunvenon por la instruistoj, kiuj gvidis la klasojn (280 geknaboj en 8 klasoj). Momente okazas taksado de ekzamenrezultoj kaj, post analizo, raporto estos prezentita al la Ministerio. Dume, la dua lerneja jaro komenciĝas kaj raportoj indikas, ke pli da geknaboj partoprenos la eksperimenton en 1976. La Ministerio reprenis la instrumaterialon en 350 ekzempleroj, sed tio jam ŝajnas esti nesufiĉa kvanto.

# Preterviditaj sociaj faktoroj en la Ido-skismo

EĈ EN LA NUNA TEMPO, kiam la Ido-skismo estas afero de pasinta historio, ankoraŭ mankas objektiva traktado pri la sociaj faktoroj en tiu skismo. Eĉ en la zorge kolektita kaj tranĉe redaktita kolekto de la leteroj de Zamenhof, fare de Waringhien, la socia fono de la konflikto estas apenaŭ aludita. Nur psikologiaj faktoroj estas menciitaj. Kvankam psikologiaj faktoroj estas gravaj, grava estas ankaŭ la socia medio en kiu la diversaj personecoj interagas. Konsiderinda do estas la socia kaj intelekta medio de la debato pri tiu problemo, kaj en la lando de la fondinto de Esperanto, kaj en la lando de ĝia firmiĝo kaj instituciigo.

Unue, grava estas la pozitiva filozofio kaj ĝia influo en Pollando. Pozitivismo emfazas la kreskon de la scienca perspektivo kaj asertas, ke teologio kaj metafiziko estas aferoj de pasintaj etapoj de la homa historio. Ĝi havis grandan influon en Pollando en la dua duono de la 19a jarcento, precipe ĉe la intelektularo. Ĝi certe havis influon je la pensado de Zamenhof. Oni povas efektive vidi la ideon de universala lingvo kiel aplikon de la scienco al la homa evoluo. Ankaŭ la fondinto de la pozitivismo, Auguste Comte, konsciis pri la graveco de la lingvo kaj religio en la solidarigo de la homaj socioj. Comte kredis, ke la pozitivismo povus esti inspiro por nova religio, la religio de la homaro. Kvankam la enhavo de la Homaranismo de Zamenhof estas malsimila al tiu de la religio de Comte, kaj baziĝas sur alia fonto, la ideoj de Comte certe havis influon je Zamenhof.

Ordo kaj progreso: jen konceptoj kiuj ambaŭ estis gravaj en la filozofio de Comte; sed li ankaŭ konsciis pri la konstanta konflikto inter tiuj du idealoj en la socia filozofio. Tiu konflikto ekzistas ankaŭ en la afero de internacia lingvo. Kio estas pli grava - kontinueco kaj stabileco per netuŝebla fundamento (Esperanto) aŭ serĉo por la plej science perfekta lingvo (Ido)? La unua preferas ordon, la dua progreson (kaj la nomo de la unua Ida periodaĵo estis *Progreso*).

Tamen ne estas tia absoluta konflikto. Progreso povas kelkfoje okazi per ordaj rimedoj. Post la Ido-skismo en 1908 multaj esperantistoj deziris ŝanĝon, sed nur per aŭtoritata, rajtigita Akademio. Sed, evidente, la nova Akademio preferis stabilecon kaj malaprobis radikalan ŝanĝon.

Post la firmiĝo kaj instituciigo de Esperanto en Francio, precipe en la komenco de la 20a jarcento, aperis du konfliktaj tendencoj. Per unu evoluaĵo, Esperanto firmiĝis kiel vivanta lingvo, parolata de vivanta popolo.

Sed samtempe oni spertis konfliktan tendencon kiu celis demistikigi la aferon de internacia lingvo. Unue venis la reago kontraŭ homaranismo kiel religio, kvankam sekularigita formo de tiu ideologio ankoraŭ restis populara. Sed samtempe okazis la reago kontraŭ la strukturo de la lingvo mem. Esperanto estis inda afero, sed estis verkita de amatoro sen la helpo de scienca, filozofia kaj lingvistika spertuloj. La Delegitaro de Couturat kaj Leau celis aŭtentikigon de ama-

Th CART



Malnova poŝtkarto, kiu prezentas profesoron Cart en lia legendiĝinta rolo de la ĉefa defendanto de la Fundamento en la "kruc-milito" dum la Ido-skismo.

tora verkaĵo fare de kompetentaj fakuloj. Ĉeestis en la delegitaj kunsidoj la lingvistoj Jespersen kaj Baudouin de Courtenay, la logikistoj Peano kaj Couturat (tiu lasta oficiale estis kasisto sed en la praktiko aktive partoprenis); kaj la kemiisto Ostwald, sur kiu pozitivismo havis gravan influon. Estas notinde ke tradicie Esperanto jam apelaciis al la ĝenerala publiko kaj iom suspektis apogon flanke de la fakuloj. Kaj tiu Delegitaro certe interesis sin prefere pri logikaj kaj sciencaj principoj, ol pri la jam ekzistanta esperantista "popolo". Estas vere, ke unu argumento por Esperanto kiel **bazo** de la nova lingvo estis la fakto, ke ĝi jam multe praktikiĝis; sed, laŭ la Delegitaro, la logiko nepre necesigis ŝanĝojn, precipe pri la derivaj reguloj. Couturat precipe forte atakis la nocion de esperantista popolo, argumentante, ke la esperantista popolo estis ŝovinistoj kaj ke ilia dogmema starpunkto similis pli multe al eklezio ol al nacio.

Samtempe la apartiĝo inter la esperantistoj kaj idistoj ne estis simpla konflikto inter la amaso kaj intelektuloj, ĉar multaj intelektuloj restis ankaŭ en la Esperanta tendaro. Ekzistas racia pravigo ankaŭ por tiu starpunkto: Estas notinde, ke tiutempe Emile Durkheim ellaboris la novan akademian studobjekton de sociologio. Li emfazis la ideon, ke sociaj faktoj ekzistas en si mem, kiel eksteraj, retenemaj faktoroj en homa konduto. Kaj notinde estas, ke rektoro Emile Boirac, prezidanto de la Esperanta **Lingva Komitato**, en rompa letero al Ostwald, argumentis ke, simile al la naciaj lingvoj, "Esperanto estas konsekvence kiel ili fakto, kaj eĉ **sociale fakto**, kiu evolucios, same kiel ĉiuj socialaj faktoj, per la agado grandaparte mem-iniciata de la homaro, kies vivon ĝi siamaniere ebligas". Resume do oni povas proponi la ideon, ke tiel la esperantistoj kiel ankaŭ la idistoj estis influitaj de pozitivismo, aŭ de ideoj kiuj rekte sekvis pozitivismon: sed kvankam la idistoj volis redukti la esperantistan "socion" al logikaj reguloj, la esperantistoj jam posedis pli "sociologian" perspektivon, kaj emfazis la ideon de Esperanto kiel socian fakton en si mem.

La plej grava kaŭzo de la skismo estis konflikto pri legitima aŭtoritato. En la pasinteco apogantoj de la Esperanto-movado jam parolis pri reformoj, sed tiu diskutado okazis interne de la movado. Kiam la esperantistoj emfazis stabilecon kaj ordon per la netuŝebleco de la *Fundamento*, akceptita per la Bulonja Deklaracio en 1905, reformemuloj turnis sin al la Delegitaro. Sole tiu organizo de intelektuloj povis serioze kontesti la oficialan ideologion de la Esperanto-movado. Ilia aŭtoritato estis valida por tiuj, kiuj akceptas la ideon, ke oni povas atingi objektivan veron en la formiĝo de internacia helplingvo. La delegitara starpunkto konfliktis kun la tradiciaj esperantistaj apelacioj al praktiko prefere ol al teorio, kaj kun la tradicia intereso de la esperantistoj pri amasa apogo. Ankaŭ Esperanto estis vundebla per premoj de striktaj logikistoj. La lingvo mem inkluzivis elementojn de eklektikismo kaj hazardeltrovo; krome, la plej alta lingva aŭtoritato de Esperanto, la **Lingva Komitato**

ne organiziĝis surbaze de lingvistika kompetenteco. Pro akademia prestiĝo kaj apogo al pozitivisma, intelektisma adorato de scienco kaj racio, la Delegitaro ne estis preta akcepti la aŭtoritaton de aro da amatoraj entuziasmoj, kiuj okupiĝis pri ekzegezo de la zamenhofaj skribaĵoj, kune kun iliaj neperfektaĵoj. La esperantistoj povis kontraŭbati la raciismon per sociologia perspektivo, sed tio ne estis akceptebla al la Delegitaro.

Estas multaj aliaj problemoj pri la Ido-skismo, precipe pri la aŭtoritato de la esperantistaj instancoj, kaj tion la movado penis solvi tuj post la skismo. Sed aliaj eksplikaĵoj de la skismo: la komercaj interesoj de Bourlet kaj Cart, la aktivecoj de de Beaufront, persona ĵaluzo diversloke, — kvankam interesaj aferoj — nur ĉirkaŭiras la plej gravan kaŭzon de la skismo.

Peter G. Forster

## NOVAJ JAPANLINGVAJ ELDONAĴOJ:

# Pli pri Esperanto

EN LA julia/aŭgusta kaj novembra numeroj de 1975 ni informis pri la notinda fakto, ke aperis pluraj japanlingvaj verkoj pri Esperanto. Tiu fluo daŭras ankaŭ en la nova jaro: La tokia eldonejo Kokudoŝa ĵus publikigis tute novan biografion de Zamenhof, verkitan de d-ro C. Kobajaŝi sub lia plumnomo Noboru Asahiga. Jam en novembro, samtempe kun la aperigo de la japana traduko de *La danĝera lingvo*, la prestiĝa eldonejo Iwanami reprenis la delonge elĉerpitan Zamenhof-biografion de Saburo Ito, unuafoje aperintan en 1950. Krome, estas anoncita la baldaŭa apero de la sepa (!) volumo de la ampleksa novela priskribo de la vivo de Zamenhof, kiun aŭtoras Kanĵi Ito. Kaj fine, KLEG reprenis la japanan tradukon (el 1932) de grava ruslingva verko, la esperantologia klasikaĵo *Lingvoscienco kaj lingvo internacia* (1931) de E.F. Spiridoviĉ.

## Amikiĝi kun libroj

La Volontula Servo de UEA serĉas novan kandidaton por la Libroservo de UEA ekde proksimume julio 1976, kiam finiĝos la servo-periodo de la nuna volontulo.

La taskoj konsistas plejparte en traktado de mendoj pri libroj kaj abonoj, fakturado, kontrolado de la stokoj kaj laŭbezona remendado. Persono kun literaturaj, bibliografiaj kaj librotenaj aŭ matematikaj interesoj plej taŭgas. Petu demandaron ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam.

## Mi ne vidis la diferencon

**Recenzas Roger Bernard (Francio):**

**Du komedioj: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo**, de C. Soldevila. El la kataluna trad. L. Mimó. Sabadell: Ediciones Riutort, 1975. 119p. 17cm.

Du komedioj de neegala longeco (1-akta kaj 3-akta), en la stilo de la jaroj 20aj, kun la fama "triangulo", kara al la franca bulvarda teatro: li, ŝi . . . kaj la alia. Du tute malsamaj situacioj: insulo dezerta, burĝa salono. Banala ekirpunkto (kokriteco) kondukanta jen, en la unua komedio, al mondumaj konvencioj, jen, en la dua, al renverso de konsideroj pri la "moderna arto" (temo tiel sprite aludita en "Wiederboren" de Clelia Conterno). Du komedioj amuzaj en sia disvolviĝo, sed pritraktantaj iom stereotipajn heroojn.

La traduko el la kataluna estas farita al "regula" Esperanto . . . Mi ne vidis, kia estas la diferenco inter la stilo de s-ro Mimó kaj tiu de multaj aliaj bonaj Esperanto-verkistoj, kiuj, laŭ li, supozeble skribas en neregula Esperanto, kvankam ankaŭ ĉe li oni povas trovi kelkajn makuletojn. Ekzemple: la gramatike regula "nuda ĉemizo" estas por mi sence iom enigma; "Jes, viro", dirita de sinjorino al sia amanto, ŝajnas al mi hispanismo (hombre! ); kaj ĉu ne estas riproĉinda francismo: "Ili (la pentraĵoj) diras al mi nenion"? Plej amuza, ĉe tiu ĝisosta atisto, estas tiu "ĝenita", kiam necesus "ĝenata".

Ja ĉiu homo povas peki pli-malpli en sia lingvouzo, sed fariĝas ĝena, kiam oni pretendas skribi en "regula, perfekta, racia ktp." Esperanto; tiam oni devus esti senriproĉa. Kaj ankoraŭ pli ĝena, ĉi-foje por la recenzanto, estas, komence kaj fine de la libro, tiu reklamo kaj pledo de la tradukinto pri sia koncepto de "logik-analiza" Esperanto kaj siaj "decidaj" tiutemaj verkoj.

**Prezo:** 10,20 (por Nederlando 10,61) gld. plus sendokostoj 10%.

## Altgrade fidela

**Recenzas A.J. Middelkoop (Nederlando):**

**Bakĥantinoj**, de Eŭripido. El la greka trad. A. Goodheir. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1975. 40p. 21cm.

En la 5a jarcento a.Kr. la greka dramisto Eŭripido verkis sian tragedion *Bakĥantinoj*. En ĝi li surscenigis la miton pri Penteo, reĝo de Tebo, kiu kontraŭstaras la kulton de Bakĥo. Lia patrino, frenezigitte de tiu dio, murdas Penteon dum la ekstaza kulta danco,

kredante ke li estas leono. La tradukinto eldiras en sia enkonduko la opinion, ke Eŭripido volis per tiu dramo esprimi ke "kiu ajn malŝatas la naturpotencon kiu estas Dionizo, invitas sian detruon. Sed ankaŭ kontraŭracia ekstazo, aperinte kiel naturidilio, ŝanĝiĝas en kolektivian perfortemon."

Traduki klasikan tragedion postulas tre grandan kapablecon. Speciale la lirikaj ĥorkantoj kaj la fulmaj pounuversaj dialogoj facile perdas iom de sia valoro. Goodheir konvinke pruvis sian kapablecon per tiu ĉi traduko. Tre sukcese li multloke konservis ekz. la ripeton de sama vorto en alia formo, ofte troviĝantan en la originalo. Kie li ne sukcesis pri tio, li tamen trovis kelkloke kompenson, ekz. per lerta apliko de afikso.

Prave li rezignis pri fideleco al la komplikaj metroj de la ĥoraĵoj, kiel faris ankaŭ D.B. Gregor en sia traduko de *Reĝo Edipo* kaj *Antigona*. Por kompensi tiun perdon Goodheir elektis asonancon. Per si mem tio ne estas malbona solvo, sed en multaj versoj la asonanco estas iom malforta. En la dialogoj la tradukinto admirinde sukcesis resti inter la limoj de pounu verso, enhave kaj ritme; vere ne facila tasko! Ankaŭ en la monologoj ni rekonas la ritmon de la originalo, kvankam ne ĉiam en ĝia rigora formo.

Apenaŭ necesas diri, ke la lingvaĵo estas bona. Nur unu makuleton mi trovis: en la 40a verso "sian" devas esti "ĝian". Sed mi ne volas fini per ĉikano kaj volonte esprimas mian admiron kaj gratulon al la tradukinto.

**Prezo:** 6,30 (por Nederlando 6,55) gld. plus sendokostoj 10%.

## Raporto pri hororo

**Recenzas Gaston Waringhien (Francio):**

**Nuda vero, La**, de G. Salan. Nimes (Francio): la aŭtoro, 1975. 188p. 22cm.

D-ro Salan, ĉefo de unu el la rezistad-organizoj en Suda Francujo, estis arestita en februaro 1944 kaj deportita en germannazian koncentrejon; transvivinta tiun teruran elprovon, li revenis hejmen kaj en 1946 publikigis la simple veran rakonton pri siaj travivaĵoj de kaptito, aŭ pli ĝuste de sklavo. Kaj nun, okaze de la trideka datreveno de sia liberiĝo, li deziris prezenti al la esperantistaj medioj la ĉefajon de sia franclingva libro; ĉar, esperantisto de 1923, sed forlasinte la movadon en 1931 pro politikaj kaŭzoj, li revenis en 1973 en niajn vicojn, kaj ni povas duoble ĝoji, ke ni retrovis fervoran kamaradon kaj ke nia literaturo riĉiĝis per jena verko. En ĝi, nenio romaneca, nenio retorika, sed kvazaŭ medicine scienca raporto pri liaj propraj spertoj dum tiu krizo de barbareco, kiu ŝtormis tra la tuta mondo kaj ŝancelis jarmile longan tradicion de ĉia humana civilizo. Oni ne povas resumi tiujn paĝojn, kie speguliĝas la sufer- kaj horror-plena ĉiutaga vivo en tiuj abomenindaj organoj de la nazia potenco.

Mi diru nur, ke antaŭ la kalvario de tiaj homoj, kiuj foroferis ĉion sian por la defendo de la libereco, mi sentas min iom honta, ke mi estis simple militkaptito, eĉ se fermita en **Sonderlager** kiel **Deutschfeindlich**.

La lingvo de la rakonto estas facila kaj flua (restis pluraj tajp- aŭ preseraroj, korektitaj en fina kromfolio — sed ne ĉiuj: p.183, linio 11, ekz-e, legu "gasumitaj") kaj la legado katenas la intereson. Al la tro ofte forge-semaj pacamantoj kaj precipe al la nescianta junularo mi insiste konsilas legi tiun libron, en kiu aŭdiĝas la senpartia voĉo de la justeco kaj de la homamo.

**Prezo:** 19,80 (por Nederlando 20,59) gld. plus sendokostoj 10%.

## Brila traduko de grava ĉefverko

**Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):**

**Kalevipoeg**, estona popola eposo (fragmentoj), de Fr. R. Kreutzwald (1803-1882). El la estona tradukis Hilda Dresen. Tallinn: Eesti Raamat, 1975. 88p. Kolorilus. 17cm.

Gravega ĉefverko el la estona literaturo, la popola eposo *Kalevipoeg* ("filo de Kalev, Kalevido"), al la disvasta esperantistaro transdonita (fragmente, tamen tutaĵimprese) en brilforma traduko de alte merita poetino Hilda Dresen: jen kultura novaĵo plej inda je atento kaj respekto. Estas bele, kiel la poetino, kiu ĝuste ĉi-jare plenigas sian 80-an vivojaron, sukcesas redoni per senriproĉaj, sonharmoniaj versoj la sortoriĉan etoson de la nobla poezio, kiu tiel multe influis la nacian konscion de la estona popolo. La fragmentaj

elektoj, kune kun klaraj prozaj resumetoj mirinde transportas la esencon de tiu ĉi poemego de 19032 versoj: la profundan spiron, la senhastan esploron, la dediĉan kreemon, plenverve konstatablan tuj en la unua kanto:

*Kiam bardo kantojn kreas  
Kaj ekrulas versojn vervajn,  
Li al fantazio fidas,  
La realon renovigas,  
Famodirojn eĉ aldonas,  
Prunteprenas el provizo  
De l' memoro multedona.  
Se la agoj adaptiĝas  
Kaj pri ver' atestas vortoj,  
Vortoj saĝaj, seneraraj,  
La kantisto lerte kreas,  
Senriproĉe kanti scias.*

La poemo *Kalevipoeg* estas klasika ekzemplo pri tio, kiel forte unuopa literatura verko povas influi la socian vivon de tuta popolo. Verkita de Friedrich Reinhold Kreutzwald (1803-1882), surbaze de estonaj legendoj kolektitaj de lia amiko Faehlmann (1798-1850), ĝi intensigis la konscion de la popolo pri sia propra folk-lora kulturo, entuziasmigis revoluciulojn kaj batalantojn por estona memstareco, influis postan literaturon kaj la plastikajn artojn de Estonio. Tamen, pri tia gravega literatura verko oni povas legi nur unu linion en *Encyclopædia Britannica* (en kunligo kun artikolo pri estona historio). En nova, dana 12-voluma historio de la mondliteraturo (*Verdenslitteraturen*) ĝi ne estas menciita eĉ per unu vorto. Pere de la internacia lingvo kaj danke al Hilda Dresen la esperantistoj ne devas tiel honte kontentiĝi en nigra nescio.

**Prezo:** 3,75 (por Nederlando 3,90) gld. plus sendokostoj 10%.

## Laste aperis . . .

**A Declaration for All.** El la angla trad. H.R. Tonkin. Burlingame: ELNA, 1975. 4p. 28cm. Dulingva eldono de la usona Deklaro de sendependiĝo (1776), kun anglalingva enkonduko.

**Adresaro de jugoslaviaj esperantistoj.** Borovo: "Voĉo", 1975. 65p. Mimeo. 20cm. Prezo: 5,25 gld.

**Aktoj de la Akademio II, 1968-1974.** Deko Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto. 80p. 23cm. 10,— gld.

**Chave do Esperanto.** Porto: M. de Freitas, 1975. 48p. 11cm. Portugala ŝlosilo. 0,50 gld.

**Deutsche Redensarten in Esperanto** (1921), Karl Minor (1891-1946). Saarbrücken: Sarlanda Esperanto-Ligo, 1975. 52p. 18cm. Germana-Esperanta esprimaro laŭ *Proverbaro Esperanta* de L.L. Zamenhof. Prezo: 4,80 gld.

**Doloro, La,** Giuseppe Ungaretti (1888-1970). Trad. el la itala Nicolino Rossi. Pisa: La Nuova Frontiera, 1975. 64p. 20cm. Poemoj verkitaj inter 1937 kaj 1946. Prezo: 8,10 gld.

**Domfabriko: 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-Esperantaj,** Ada Csiszár, Kálmán Kalocsay. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1975. 190p. 20cm. Alfabeto aranĝita laŭ la hungaraj esprimoj, kies tradukoj en pluraj kuntekstoj estas donitaj en Esperanto. Prezo: 13,20 gld.

**Grete kaj Jep,** K. Hermansen kaj E. Jensen. El la dana trad. G. Riisberg. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1975. 40p. Ilus. Mimeo. 20cm. ISBN 87 85020 869. Legolibro por infanoj. 2,64 gld.

**Neforgeseblaj tagoj (1972), 2a parto,** Vo Nguyen Giap. Trad. el la vjetnama. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1975. 264p. 19cm. Prezo: 3,— gld.

**Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik.** Redaktis R. Haupenthal. Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft, 1976. 365p. 20cm. Bind. ISBN 3-534-05462-8. Germanlingva internacia krestomatio de interlingvistikaj tekstoj de 21 aŭtoroj, verkintaj dum la lastaj cent jaroj; kun antaŭparolo kaj ampleksa 15-paĝa bibliografio de R. Haupenthal. Prezo: 67,— gld.

**Praktika kurso de Esperanto,** Andrzej Pettyn. Varsovio: PEA, 1975. 268p. en 4 kajeroj. Mimeo. 20cm. Klarigoj kaj ekzercoj en la pola lingvo. Prezo: 6,90 gld.

**Pramejo Litorinkonko,** Ma Gengkjuan, Ma Li. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1975. 44p. Kolorilus. 21cm. Aventurrakonto. 1,20 gld.

**LIBROSERVO DE UEA,** Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 16% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimуме 3,— guldenoj**.

# Tutlandaj studkonkursoj

EN LA HUNGARA pedagogio ekzistas kutimo: ĉiujare aranĝi konkursojn el la diversaj studobjektoj, por ke la plej elstaraj, eminentaj lernantoj — elementlernejoj kaj mezlernejoj — povu pruvi la akiritan scion. Tiu bonega ideo ĝis hodiaŭ mankis en nia Movado. En urbo Gyula iniciatis la subskribinto la unuan departementan studkonkurson pri Esperanto en 1968. La rezulto de tiu departement-nivela studkonkurso estis tiel esperiga, ke en 1969 ni jam aranĝis la Unuan Tutlandan Esperanto-Studkonkurson en Gyula. En la pasinta jaro estis aranĝita la 7a Tutlanda Studkonkurso, kaj partoprenis ĝin 54 diversaĝaj gelernantoj! Ni povas jam aserti, ke la Studkonkurso eniĝis en la landa Esperanto-movado, kaj fariĝis ia instigilo lerni la lingvon, atingi ĉiam pli bonajn rezultojn.

Kial ni iniciatis la Studkonkursojn?

La sperto montris tion, ke la junaj esperantistoj post kelkajara studado forlasas la Movadon. Ili perdiĝas por la lingvo. Ne ĉiu urbo aŭ vilaĝo havas tian fortan lokan movadon, kiu povas transpreni la lernemulojn kaj gvidi ilin al la perfekta lingvoscio kaj landa movado. Sed, se ni kapablas doni al la junaj esperantistoj pozitivajn emociojn, ni pli facile povas ilin ligi al la lingvo kaj movado. Dum la Studkonkursoj ni povas kunvoki gejunulojn el la diversaj partoj de la lando por pritrakti lokajn Esperantajn eventojn kaj ekkoni unu la alian. Mallonge dirite: ni povas al ili prezenti etan parton de Esperantujo!

La Hungara Esperanto-Asocio certigis monon por aĉeti premie esperantlingvajn librojn. Kelkfoje, ni povis doni monpremion al kelkaj elstaraj infanoj. Jam delonge, dank' al departementa Esperanto-Komitato, ni povas certigi senpagan tendumadon por la plej lertaj infanoj. Kiam okazis la Viena UK, ni unuafoje sendis konkursinton senpage partopreni la Infankongreseton (István Kovács el Tatabánya); en 1975 Beata Sahin el Budapeŝto partoprenis la Kongreson en Danlando. Ili ambaŭ estis gajnintoj de la Tutlanda Esperanto-Studkonkurso.

Ni jam povas aserti, ke la sana konkuremo estas instigilo, tiel por la partoprenantoj kiel por la instruistoj. Kiam ni komencis la konkursojn, la partoprenintojn helpis la lernejo, aŭ la loka Esperanto-grupo, aŭ — kompreneble la gepatroj. Sed jam kelkajn jarojn la vojaĝkostojn ĝenerale transprenas alia infana organizaĵo. Ĉiujare, laŭ la spertoj, ni modifis la partoprenkondiĉojn. Nia ĉefa celo estis: konvinkiĝi pri la lingvoscio de la gelernantoj, kiuj dum la prepara tempo ekkonu skize la plej ĉefajn trajtojn de la Esperantaj literaturo kaj movado.

Mi nur skize povis raporti pri la studkonkurso aranĝata ĉiujare en Hungario. Sed eble vi povas vidi la esencon jam el tiu mallonga raporto: ni donis eblecon al la gelernantoj pruvi sian lingvoscion inter ambiciaj kunuloj. Ĉi-jare ni jam la okan fojon aranĝos ĝin, kaj kompreneble envenis la kapon la ideo, kiam ni povos unuafoje aranĝi la Internacian Esperanto-Studkonkurson por la plej junaj esperantistoj? Kompreneble, se aliaj landaj organizaĵoj komencos aranĝadi sian propran konkurson, post iom da tempo tiu ideo eble realiĝos.

Zsolt Gyarmathy, inspektoro

## PUPTEATRA FESTIVALO:

# La naŭa PIF

JAM LA NAŬAN FOJON, de la 22a ĝis la 28a de septembro 1976, en Zagreb kaj Sisak (Jugoslavio), okazos Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). Ankaŭ ĉi-jare ĝi prezentiĝos en 3 sekcioj: A. "Pupoj parolas al infanoj", B. Novaj esploroj en pupismo, C. "Infanoj por infanoj".

Por la unuaj du sekcioj ĵus estis elektitaj partoprenontaj eksterlandaj ensembloj; restas elektotaj jugoslaviaj kaj infanaj ensembloj.

En la sekcio A estos prezentitaj jenaj spektakloj: "Tri dometoj, tri vojoj" de Constantinescu (Braila, Rumanio), "Laŭ ordono de la ezoko" (Jambol, Bulgario), "La Forĝisto" de Morcinek (Bielsko-Biala, Pollando), "Nokto" de Montserat (Madrid, Hispanio).

En la sekcio B montriĝos la pupteatroj el Braŝov (Rumanio), Poznań (Pollando) kaj Metz (Francio) respektive kun "Ŝerce" de A. Predescu, "La tigrido" de H. Januszewska kaj adaptaĵo de Lorca. Krome, pupteatro el Palermo (Sicilio) kiel gasto prezentos kavalireskajn scenojn inspiritajn de la franca historio el la tempo de Karlo la Granda.

Dum PIF, kiel ĉiujare, estos organizita internacia infanrenkontiĝo. Infangrupoj el diversaj landoj gastos interŝanĝe. Ĉi-jare PIF atendas kaj aparte bonvenigas gastojn-rigardantojn el eksterlando kaj por ili antaŭvidas komunan loĝadon en plurlitaj ĉambroj en junulargastejo (akceptataj ankaŭ plenkreskuloj), kun manĝoj kaj vizito de ĉiuj prezentotaj spektakloj, de la 23a ĝis la 27a de septembro, kun kotizo de 800,— dinaroj. Aliĝojn oni akceptas ĝis la 31a de Julio.

Kiu deziras loĝi en hotelo, kalkulu pri elspezo de 6—12 dolaroj por tranoktado kaj 1—3 dol. por manĝo en memservejo aŭ meza restoracio. La organizantoj volonte peros la hotelrezervadon post aliĝpago de 25 dolaroj, kiu reprezentas partopagon de la hotelkostoj kaj la kotizon por rigardo de ĉiuj spektakloj.

La adreso de PIF estas: Pupteatra Internacia Festivalo, Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5/I, PF 499, 41001 Zagreb, Jugoslavio.



# Kongresa Komunikilo

## 61a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Ateno 1976 07 31 – 08 07

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Poŝtkesto 3766, Poŝtoŭicejo Levidu, Ateno, Greklando.

### Ministerio subvencias

La greka Ministerio de Civilizo asignis al la 61a Universala Kongreso subvencion de 100 000 draĥmoj (ĉ. 8 000 guldenoj). Krom tiu financa apogo, la Kongreso ricevis valoran helpon en la formo de senpagaj kunvenejoj, reklamiloj k.s. de diversaj ŝtataj kaj urbaj instancoj.

### Regiona kunlaboro

Pri la ĉeftemo de la Kongreso – "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo" (kun aparta atento al la lingva problemo) – traktos la Dua Ĝenerala Kunsido de UEA en vendredo, la 6an de aŭgusto. Al tiu kunsido estos invititaj gastparolantoj, reprezentantoj de diversaj interŝtataj organizaĵoj. Tiel decidis la Estraro de UEA en sia aprila kunsido, kiam ĝi fiksas la detalan programon de la venonta UK. Per tio ĝi celas, simile kiel per la Forumo pri la lingva problemo en Londono en 1971, altiri la atenton de eksteraj instancoj kaj de la gazetaro al la Kongreso.

### Lernu argumenti!

Per la dua ĉeftemo de la atena UK – "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto" – la kongresanoj havos okazon lerni per vivaj ekzemploj la arton de efika pledado por la Internacia Lingvo. La formo de tiu diskuto estos plia novigo de la kongresprogramo. Kopenhago enkondukis unuafoje en la UK la ĉetablan diskutadon, kun multaj apartaj diskutrondoj. En Ateno okazos unuafoje podia diskutado, en kiu respondos al demandoj grupo de kompetentuloj sur la kampo de informado.

### Kio estas kvizo?

La vorto "kvizo" ne estas trovebla en *Plena Ilustrita Vortaro*, kvankam ĝia radiko estas jam vaste internaciiginta. Temas esence pri sci- (ne ski-) konkurso. Teamo konsistanta kutime el personoj aparte sciplenaj pri difinita temo (aŭ pri ĉiaj temoj) konkuras kontraŭ alia simila teamo, gajnante poentojn per sukcesaj respondoj al malfacilaj demandoj. Kiu ankoraŭ ne komprenas, kio estas "kvizo", tiu nepre venu al Ateno, ĉar tie okazos eble la unua granda kvizo en la historio de la UK. Teamoj konsistantaj el konataj kaj konantaj figuroj de la Esperanto-movado publike konkursos per sia erudicio pri Esperanto, ĝiaj historio, movado, lingvistiko, literaturo ktp. Laŭ la aŭguroj, temas pri aparte amuza kaj samtempe kleriga iniciato.

### UEA-agado – pli publika diskuto

Unu el la plej rimarkeblaj trajtoj de la atena kongresprogramo – parte jam konstatebla en tiu de Kopenhago – estas la nombro de kunvenoj dediĉitaj al publika diskuto pri diversaj aspektoj de la agado de UEA. Ne temas nur pri tio, ke en la Unua Ĝenerala Kunsido de UEA, kiu pritraktas la Raporton de la Estraro pri la pasinta laborjaro, la maniero de prezento pli multe stimulis kaj ebligis – jam en Kopenhago – publikan diskuton. Temas pri tio, ke, krom ĉiuj kunsidoj de la Komitato de UEA (kompreneble ĉiam publikaj) kaj krom ĉiuj kunsidoj de fakaj kaj similaj organizaĵoj, okazas multaj malgrandaj – sed publikaj – kunsidoj rekte organizitaj de UEA. Unue, la kunsidoj de la diversaj komisionoj de la Komitato (pri financo, eksteraj rilatoj, informado, kongresoj, landaj asocioj, statuto) bonvenigas publikan ĉeeston. Sed krome, en Ateno okazos publikaj kunsidoj pri kultura agado, pri la UN-programo "Habitat", pri agado ĉe politikaj partioj, pri agado en parlamentoj, pri edukado, pri la Financa Programo de la Esperanto-Movado, pri instrumentadoj, pri UN-agado, ekstereŭropa agado, virina agado, pri CED kaj pri esperantologio – kaj eble ankoraŭ aliaj temoj. Ĉio ĉi signifas konsiderindan riĉigon de la labora parto de la kongresprogramo.

### Rekorde ampleksa ISU-programo

Senprecedence riĉa estas la ĉi-jara programo de la Internacia Somera Universitato. En ĝia kadro okazos entute 12 prelegoj de 12 profesoroj el 11 landoj, pluraj unufojaj seminarioj por personoj aparte interesitaj pri la koncernaj fakoj, kaj aparta 6-hora seminario pri "Esperanto kaj lingvistiko" (v. nian martan numeron, p.55).

Prelegos: William Auld (Britio) pri "Lingvo kaj kulturo"; Belka Beleva (Bulgario) pri "La teatra parolformo"; Werner Bormann (FR Germanio) pri "Entiriĝo de kulturpolitiko en nur ekonomian integriĝon"; Michel Duc Goninaz (Francio) pri "La terminoj de alparolo kiel sociolingvistika problemo"; Helmar Frank (FR Germanio) pri "Kibernetiko en instruado"; Sin'itirô Kawamura (Japanio) pri "Originoj de la vivo"; Jonathan Pool (Usono) pri "Lingvo kaj identeco"; Baldur Ragnarsson (Islando) pri "La pozicio de la islanda literaturo en la literaturo monda"; Miodrag Stojanović (Jugoslavio) pri "Grekaj popolaj kantoj en serba traduko"; C. Støp-Bowitz (Norvegio) pri "Kial kelkfoje maraj moluskoj fariĝas venenaj"; István Szerdahelyi (Hungario) pri "Novaj elementoj en la problemaro 'signo-signifo' en la spegulo de konscie konstruita lingvo"; Aloïs Wenclewski (Zairio) pri "Ĝenerala superrigardo je la vitaminoj".

### Omaĝo al Kalocsay

La Internacia Arta Vespero en Ateno estos dediĉita al la granda Esperanta poeto, tradukisto, redaktoro

kaj gramatikisto Kálmán Kalocsay, kiu forpasis en Budapeŝt la 27an de februaro ĉi-jare. La aranĝon reĝisoros William Auld. Krom tiu pli solena programo ne mankos ankaŭ pli leĝeraj muzikaj aŭ distraj aranĝoj.

### **Fine — aŝioj!**

Fine aperis tri belegaj grandformataj aŝioj pri Greklando kun la surskribo: "Grekujo bonvenigas vin en 1976 al la 61a Universala Kongreso de Esperanto". Eldonkvanto: po 3 000 ekz. La aŝiojn jam distribuas la Nacia Turisma Oficejo en Ateno. Pliaj interesitoj turnu sin al LKK.

### **Ĵurnalistoj akceptitaj en Ateno**

Dum vizito de la aganta KKS al Ateno en marto estis aranĝitaj du akceptoj en la salonoj de la Asocio de Eksterlandaj Ĵurnalistoj. La unuan ĉeestis ĵurnalistoj kaj diplomatoj i.a. el Greklando, Japanio, Svislando, Nederlando, FR Germanio, Pollando, Svedio, Francio kaj Tajvano; la duan vizitis la ŝtata televido kaj pluraj grekaj gazetoj. Rezultis pluraj pozitivaj artikoloj en la gazetaro.

### **Infanoj apudmare**

La 16a Internacia Infana Kongreseto, kiu okazos paralele kun la Universala Kongreso, havos kiel ejon belan duetaĝan domon en la kvartalo Nea Smirni, proksime al la maro. La domo, kiu havas proprajn ĝardenon kaj korton ĉirkaŭitajn de arboj, estas ĵus re-farbita kaj reekipita kaj normale servas kiel infan-vartejo. Partopreno en la Infankongreseto kostas por ĉiu infano 150,— guldenojn, inkluzive de loĝado, manĝoj, ekskursoj, asekuro ktp. Aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso en Rotterdam.

### **La Postkongreson necesas frue mendi!**

Kiel postkongresan ekskurson LKK proponas al vi ŝipkrozaĉon kun vizitoj al la insuloj Delos, Mikonos, Rodos, Kreto kaj Santorini. La aranĝo daŭras tri tagnoktojn kaj estos el ĉiuj vidpunktoj unuaklasa. Pro la luksa ŝipo kaj unuaklasaj servoj, ankaŭ la prezoj ne povas esti modestaj: ili varias de 443 ĝis 1161 guldenoj por ĉiu persono, depende de la speco de kajuto. Plenaj detaloj kaj mendilo troviĝas en la Dua Bulteno. Ĉar la disponeblaj lokoj estas strikte limigitaj, necesas frue sin anonci, se oni volas garanti sian partoprenon.

### **Ĉio troveblas en la Dua Bulteno**

Se vi serĉas informojn pri grekaj ambasadoj, pri loĝado en la Studenta Domo, pri la preciza vojplano de la diversaj kongresaj ekskursoj, pri la menuo de la bankedo, pri la flugkaravanoj aŭ aŭtoveturado, pri la Cseh-seminario, pri hoteloj aŭ pri multaj aliaj temoj, la respondojn vi trovos en la Dua Oficiala Bulteno — kune kun ĉiuj necesaj mendiloj, aliĝiloj kaj instrukcioj. La Bulteno estis dissendita komence de aprilo al ĉiuj aliĝintoj, gazetaro k.a.

### **Ĉu eblas malpli koste?**

Apenaŭ estas imageblaj pli favoraj loĝkondiĉoj, ol ĉi-jare en Ateno. La unulitaj ĉambroj de la studentaj

domoj estas senrezerve rekomendeblaj kaj la prezo estas agrable surpriza: nur po 12,— guldenoj por ĉiu person/nokto, inkluzive de matenmanĝo. Mendilo en la Dua Bulteno.

### **Literaturo estos alirebla**

La Esperanta literaturo fariĝos pli alirebla por la Atena publiko en la semajnoj antaŭ kaj dum la Universala Kongreso. Laŭ interkonsento kun UEA, la plej prestiĝa librovendejo de la ĉefurbo dediĉos montro-fenestron al la Internacia Lingvo kaj tie disvendos ĉiajn Esperanto-librojn — kompreneble inkluzive de lernolibroj — al la kongresanoj kaj al la ĝenerala publiko.

### **Elektu vian karavanon!**

Ekzistas vera amaso da eblaj veturmanieroj por atingi Atenon malmultekoste. Ne nepre necesas aliĝi al Esperanta karavano: se konvena Esperanta aranĝo ne ekzistas por la vojo aŭ datoj, kiujn vi preferas, turnu vin al iu ajn vojaĝagentejo. Tie oni kredeble povos proponi al vi elekton inter pluraj malmultekostaj flugeblecoj. Tamen jam la listo de Esperantaj karavanoj estas sufiĉe impona. Krom la jam anoncitaj (el kiuj 14 aperas en listo en la Dua Bulteno) aldoniĝas jenaj: Pola grupo de 47 personoj alvojaĝos el Varsovio aŭtobuse. Detalojn donas Pola E-Asocio. La svisa peranto, s-ro Walder (Esperantoweg, 8590 Romanshorn; tel. 071 — 63 26 04), proponas flugkaravanon de 07 31 ĝis 08 07 el Zŭrich. El Hispanio karavanon organizas la agentejo Viajes Marsans S.A., Princesa 31, Madrid, de 07 30 ĝis 08 08. Vere malmultekosta montriĝis la skandinavia karavano de la pasintjara LKK-prezidanto Gustav Kŭhlmann. Ekflugo el Kopenhago je 07 28, reveno je 08 11. Prezo ĉion inkluziva: 1700 danaj kronoj. La prezo de la jam anoncita flugo el Toronto (Kanado) estas \$599. Fine, alian karavanon el Skandinavio (nur unusemajnan) anoncis s-ro E. W. Anjou, Södra Vägen 6, S-412 54 Gotenburgo, Svedio.

### **Ne timu la varmon**

Ateno en aŭgusto estas varma urbo. Tamen ĝi ne estas pli varma, ol multaj aliaj mediteraneaj urboj, kaj centmiloj da turistoj vizitas ĝin ĉiujare sentime. La meza minimuma temperaturo en aŭgusto estas 22,4°C — la meza maksimuma estas 32,4°C. Kiuj ne ŝatas varmon, tiuj cetere povas facile pasigi la plej varmajn horojn en la klimatizitaj ejoj de la kongresejo, hoteloj k.s.

### **Statistiko: Jam 46 landoj**

Ĝis la 23a de aprilo estis registritaj 761 kongresanoj el 46 landoj: Franc. 97, Ital. 63, Ned., Sved. po 54, Finn., FRG. po 51, Jug. 47, Brit. 42, US. 34, Belg. 30, Bulg., Grek. po 23, Danl. 21, Jap., Svis. po 20, Poll. 11, Aŭst., Hisp., Norv. po 10, Hung., Isr., Kan., Meks. po 8, Aŭstral. 7, Isl. 6, Iran., Luks. po 5, Braz., Nov-Z., Port., Sud-Afr. po 3, Ĉeĥosl., Egipt., Irak., Kor., Mar., Rum., Sov., Venez. po 2, Arg., Indon., Irl., Mal. Resp., Mon., Vjet., Zair. po 1.

## Italio

- Sicilia Esperanto-Klubo "Stefano La Colla", en Palermo, organizas plian internacian renkontiĝon survoje al la 61a UK en Ateno. Temas pri tutsemajna turisma aranĝo, inter la 24a kaj 30a de julio, dum kiu oni vizitos la plej gravajn vidindaĵojn de Sicilio, antaŭ ol komune ekvojaĝi al la Kongreso en Ateno. Detalojn bv. peti ĉe la adreso de la Klubo: Via G. Turrisi Colonna, 9, I-90141 Palermo.

## Argentino

- Laŭ informo de s-ro Hugo A. Lingua, gvidanto de Argentina Lernejo de Esperanto, al liaj anoncetoj pri koresponda kurso de Esperanto en ĵurnalo en Kolombio kaj en alia en Kostariko venis ĉ. 400 informpetoj pri la Internacia Lingvo. S-ro Lingua, krome, asertas, ke en lia loĝloko Rosario (Argentino) nuntempe funkcias pli da Esperanto-kursoj, ol okazis dum la tuta lasta jardeko; la kursanoj estas ĉefe geinstruistoj.

## Soveta Unio

- Antaŭ nelonge en Moskvo aperis popularscienca verko *Vojaĝo en la vorton* de E. Vartanjan, kun tre bona ĉapitro pri Esperanto, inkluzivanta ankaŭ koncizan gramatikon kaj specimenan vortareton. La eldonkvanto de la libro estis cent mil ekzempleroj.

## FR Germanio

- Inter la 24a de aprilo kaj la 9a de majo 1976, en la urbodomo de Augsburg okazas granda aranĝo sub la nomo "Germana Esperanto-Ekspozicio 1976". La ekspozicio, kies moto estas "Esperanto — revo aŭ realaĵo", okazas sub la protekto de la urbestro de Augsburg. La ekspozicion organizis la loka Esperanto-grupo kaj la eldonejo L. Pickel.

## Hispanio

- Kiel kutime dum pluraj lastaj jaroj, la Internacia Foiro de Barcelono, kiu okazos la 44an fojon en la unuaj dek tagoj de junio ĉi-jare, eldonis belan plurkoloran afiŝon ankaŭ en Esperanto.

## Finnlando

- Fine de marto ĉi-jare, en la nova kaj vasta oficejo de la Lerneja Administracio de Finnlando en Helsinki okazis tre sukcesa ekspozicio de la Esperanta literaturo. Dum la ekspozicio klare montriĝis, ke la nunaj rilatoj de EAF kun la lernejaj aŭtoritatoj de Finnlando estas pli bonaj ol iam ajn antaŭe. Simila ekspozicio pli frue okazis en Tampere.

# Fake

## Literaturo

- En la Esperanta branĉo de la internacia literatura premio "The Whole World Highway", organizita en Como (Italio) kaj prizorgita de s-ro Aldo de' Giorgi, la premiojn gajnis: J. Kořinek, M. Kuroda kaj C. Pessino (por libertemaj poemoj); A. Logvin, E. Urbanová kaj K. Alek-

sova (por poemoj pri la paco); A. Goodhier, K. Walraamoen kaj L. Gabrielli (por eldonitaj poemplibro).

## Informado

- UEA ĵus eldonis en 4 000 ekzempleroj tute novan nederlandan tradukon de la plej konata CED-dokumento *Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)* de prof. I. Lapenna. Temas pri la dua eldono de tiu dokumento en la nederlanda lingvo. Entute ĝi aperis ĝis nun en 17 eldonoj en 13 lingvoj.

## Instruado

- Pastro Johano B. Kao, kiu instruas ĉe la Katolika Universitato Fu-ĵen en Tajvano, ĵus sendis al ni jenan informon: "Mi komencis novan kurson de Esperanto en la Universitato. Pli ol 120 studentoj petis permeson partopreni la kurson. Mi gvidas kurson ankaŭ por malgranda grupo de progresintoj. Mi ĵus finis dumonatan kurson por la profesiuloj de la urbo Taipei."

# Persone



## Dresen

- La 11an de majo fariĝos 80-jara elstara Esperanta poetino kaj tradukistino el Estonio, honora membro de UEA, Hilda Dresen. Ŝi konatiĝis kun Esperanto en 1913 pere de sia fratino Helmi, kiun murdis nazioj en 1941. Hilda Dresen fariĝis konata poeto kaj tradukisto jam en la 20aj kaj 30aj jaroj, kvankam ŝia unua libro de originalaj poemoj aperis nur en 1967 (*Norda naturo*,

eld. J. Régulo, La Laguna). Malgraŭ sia aĝo Hilda Dresen restas ankoraŭ mirinde aktiva, precipe sur la traduka kampo (v. aliloke en ĉi tiu numero recenzon pri ŝia traduko de *Kalevipoeg*).

## Palme

- La sveda ĉefministro, s-ro Olof Palme, sendis interesan mesaĝon al *SLEA-Infomilo*, gazeto de SAT-membroj en Svedio. En la mesaĝo, ligita al la baldaŭa SAT-Kongreso en Gotenburgo, s-ro Palme i.a. notas la mankon de studo pri la temo "Sveda laborista movado kaj Esperanto". La sveda ĉefministro estas konvinkita, ke ekzistas kunligo inter kleriga soifo, internacia engaĝo kaj lernado de Esperanto ĉe la sveda laboristaro en la 20'aj kaj 30'aj jaroj de ĉi tiu jarcento. "Mi do opinias, ke la Esperanto-movado metis parton de la fundamento al la internacia intereso, kiu hodiaŭ troviĝas en la laborista movado. Pro tio estas tute evidente,... ke ĝi ankaŭ estonte havos gravan taskon en la akcelo de internacia kompreno kaj kunlaboro."

liam Thomson, brita skoltestro. Dum la unua mondmilito li ekhavis la ideon fondi *Skoltan Esperantistan Ligon* (SEL). Li servis kiel prezidanto de SEL de 1918 ĝis 1936.

b. E. ĈEFEĈ devenas de la angla prononco de la komencliteroj de la nomo Herbert F. Höveler (1859 - 1918), germandevena anglo kaj industria kemiisto. Li ekideis la eldonon de la famaj "ŝlosiloj" de Esperanto. La unua, en la angla lingvo, aperis en 1905. En 1908 li fondis la Esperantistan Ĉekbankon. En la jaroj 1911-1912 li ellaboris teorion pri vortformado en Esperanto, kiu kontraŭas al tiu de René de Saussure.

c. EMBA estas formita de la komenc-silaboj de Emeriko (Imre) Baranyai (1902-1961), hungara pentraĵaganto, kiu aktivis en la laborista Esperanto-movado. Krom originala poezio en Esperanto li verkis ankaŭ romanon, *Maria kaj la Grupo* (1936), kiu pritraktis la internan vivon de Esperanto-grupo. Lia lasta poezia verko, *Ekzilo kaj Azilo*, aperis en 1962.

ĉ. JOROŜO konsistas el la komencliteroj de Joseph R. Scherer (1901-1967), svisa bankoficisto, kiu transloĝiĝis al Usono. Kiel speciala delegito de *Internacia Centra Komitato* (ICK), li faris la plej gravan prelegvojaĝon iam entreprenitan per Esperanto. Inter 1930-1932 li ĉirkaŭiris la tutan mondon vizitante 41 landojn kaj farante 322 prelegojn. Li priskribis siajn spertojn en *Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo* (1933).

d. LOZO devenas de la komencliteroj de d-ro Leono Zamenhof (1875-1934), frato de d-ro L.L. Zamenhof. Li estis kuracisto, fakulo pri orel-, naz- kaj gorĝ-malsanoj kaj estis la unua redaktoro de *Pola Esperantisto*. Li publikigis tradukaĵojn el la pola literaturo kaj ankaŭ originalajn verkojn. Kelkaj el liaj poemoj estis kolektitaj en la libro *Mia Liro* (1909).

## Demandoj

2. Ĉi tiu demando konsistas el la nomoj de kvin ŝipoj, sur kiuj veturis Esperanto-parolantaj pasaĝeroj. Ĉiu vojaĝo rilatas al Esperanto-kongreso. Ĉu vi scias, kiam okazis la kongreso kaj kiun vojplanon havis la ŝipo?

a. ONWARD b. GEORGE WASHINGTON c. KAISERIN AUGUSTA VICTORIA ĉ. SINAIA d. CARIBIA

**TARIFO:** Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.



**Pri turismo, muziko** ktp. deziras korespondi 29-jara oficistino en kirurgia fako de la urba hospitalo: Katarina Faragó, Bocskai u. 13, H-6800 Hódmezővásárhely, Hungario.

**Kompetentaj esperantistoj** bezonataj, pretaj korespondi kun infanoj alilandaj, por teni ties intereson. Petu detalojn pri Geonkloj Esperantistaj, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, M31 - 1PS, Anglujo.

**Asen Doĉev** transloĝiĝis de Târgoviște, Bulgario, al RSFSR, Kurskaja oblast, Ĵeleznogorsk, ul. Lenina dom 48/1, kv. 100, kie li fariĝis D kaj FD.

**Mi invitas esperantistojn**, kiuj vizitos Bagdadon, esti miaj personaj gastoj dum 7-10 tagoj (senpage). La periodo kiam estas certe, ke mi kutime estas en Bagdado (kaj tiu-periode estas la plej agrabla vetero en Irako) estas: oktobro, novembro, decembro, januaro. Bonvolu informi min antaŭe: Husen Al-Amily, Dafterdar Building, Bagdado, Irako.

**Trikolora glumarko**, profesie moderna, distinge impresa pri SAT-kongreso en Gotenburgo, 24 - 30a de julio 1976. Folio kun 10 markoj Skr. 2,50 (aŭ 2 rpk) inkl. sendokostojn. Sveda poŝtgiro 51 57 85-4, Ivar Paulsson, Algatan 3, S-171 33 Solna, Svedio. Petu samtempe informilon pri la kongreso.

**Vojaĝonte** al Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, skribu sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002) por peti cirkuleron kun speciale utilaj informoj.

# Anoncetoj

**Ĉiaspecajn poŝtmarkojn** daŭre akceptas la Centra Oficejo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) por disvendo favore al la asocia kaso. Ni petas vin konservi la poŝtmarkojn de sur viaj leteroj, kolekti ilin de viaj amikoj kaj lokaj firmoj, kaj sendi ilin al la C.O. Antaŭdankon!

**Francaj geknaboj** 11-14-jaraj deziras korespondi tutmonde. Skribu unue al ilia instruisto: Daniel Luez, C.E.S. Lenain, F-02000 Laon, Francio.

**Skandinavia** aviadila karavano unusemajna al Ateno de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto per koneksaj aeroplanoj en Arlanda, Torslanda, Malmö kaj Kopenhago. Petu informojn kaj aliĝilojn: S-ro E.W. Anjou, Södra vägen 6, S-412 54 Gotenburgo, Svedio.

**Esperantistaj kolektantoj:** Senpage registrado en niaj listoj tutmonde disvastigataj. Detalojn, klarigojn kontraŭ unu irk. R. Melo, Moulin du Milieu, Cinq Mars, F-37130 Langeais, Francio.

**Ni provos malfermi kurson** por liceanoj. Tuj sendu instige poŝtkarton al: Groupe Esperanto, C.E.S. Van Gogh, F-13200, Arles, Francio.

**Kolektanto** serĉadas kaj interŝanĝadas biero-subumojn bonstatajn el la tuta mondo. Mi kontraŭdonas ankaŭ p.m. Harry Borchert, D-330 Goslar 2, Hindenburgstr. 4, FRG.

**Pri sociaj problemoj** de virinoj kaj pri la virinisma movado deziras korespondi usonanino. Mary Rose Curtis, 6208 Madawaska Road, Washington D.C. 20016 Usono.

**Adresŝanĝo Tonkin:** Bonvolu noti, ke la aktuala (brita) adreso de la prezidanto de UEA validas nur ĝis la fino de junio. Post tiu dato kaj ĝis la fino de aŭgusto, skribu al li ĉe la Centra Oficejo en Rotterdam. Ekde septembro 1976 lia adreso denove estos: 35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono, telefonnumero: (215) CL9-8821. Skribu al Usono ĉiam aerpoŝte.

# HELSINGØR 1976

## Mondkonata kursloko en Danlando

La Internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj okazos de la 18a ĝis la 24a de julio 1976. Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Kaptu la okazon komenci aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo.

Programo senpage havebla ĉe Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør, Danlando.

SPIRITA ELDONA SOCIETO F.V. LORENZ, fondita la 15an de decembro 1975:

- Sendas ĉiumonate al la membroj Esperanto-libron pri spirita temo.
- Modesta membrokoto sendebla en partoj.
- Programo por la unua periodo: Bhagavad-Gita, Homeopatio kaj Spiritismo, Sur la Vojo al la Lumo, Okazis en la jaroj 2000 kaj 300, Tiel diris la Majstro.
- Petu informojn ĉe: Poŝtkesto 3133, Rio de Janeiro, Brazilo.

## LA ALTERNATIVO ESTAS SUPERA LINGVO AŬ ĴARGONO; REGULA AŬ ĤAOSA ESPERANTO.

Legu kaj analizu la verkojn de L. Mimó kun la solaj gramatikaj elementoj donitaj de Zamenhof:

*Du komedioj: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo.* Prezo 10,20 guldenoj. *Kompleta lernolibro de regula Esperanto.* Prezo 17,82 guldenoj. *Perfekteco de la Esperantaj verboj*, kun suplemento. Prezo 3,66 guldenoj.



## Altkvalitaj produktoj

desinfektado  
higieno

aerrefreŝigo  
tualetpurigilo  
tubopurigilo  
senkrustigilo  
herbicidoj  
betonhardilo  
insekticidoj  
tankprotektilo  
multaj specialaj  
produktoj

Kemia Fabriko Bruno Vogelmann,  
D-7180 Crailsheim, FR Germanio

# S U K 76

Petu pliajn informojn kaj aliĝilon:

**SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ**, Boîte Postale 9,  
B-4000 Liège 3, Belgio.

## BIOLOGIO – MATEMATIKO – SOCIOLOGIO UNIVERSITATO DE ANTVERPEN, BELGIO, 1976 08 08 – 29 SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

### PROGRAMO de la sekcio "MATEMATIKO":

1976 08 08 – 15

D-ro W.F. Orr (Usono): Multedroj kaj multoĉeloj

D-ro O. Reiersøl (Norvegio): Probablokalkulo – unua parto

1976 08 15 – 22

D-ro W.F. Orr (Usono): Finiaj geometrioj kaj reto-teorio – unua parto

D-ro O. Reiersøl (Norvegio): Probablokalkulo – dua parto

1976 08 22 – 29

D-ro W.F. Orr (Usono): Finiaj geometrioj kaj reto-teorio – dua parto

D-ro W.F. Orr (Usono): Enkonduko al ne-eŭklidaj geometrioj

Pri la programo de la du aliaj sekcioj bonvolu konsulti la numerojn 842 (februaro) kaj 843 (marto) de ĉi tiu revuo aŭ peti informojn ĉe la adreso de Someraj Universitataj Kursoj.

Ĉiu semajna kurso enhavos minimume 8 lekciojn de po 45 minutoj; okazos ankaŭ praktikaj ekzercoj kaj studvizitoj. La kromprogramo konsistas el perfektiga Esperanto-kurso, ekskursoj, sportado, prelegoj, film-vesperoj ktp.

**PARTOPRENKONDIĈO:** abiturienteco aŭ almenaŭ samnivela klereco.

### KOTIZOJ:

| Partoprenodum | Kategorio A             |                  | Kategorio B             |                  |
|---------------|-------------------------|------------------|-------------------------|------------------|
|               | Kotizo (belgaj frankoj) | Deviga antaŭpago | Kotizo (belgaj frankoj) | Deviga antaŭpago |
| 3 semajnoj    | 7000,-                  | 2000,-           | 10000,-                 | 2500,-           |
| 2 semajnoj    | 5000,-                  | 1500,-           | 7500,-                  | 2000,-           |
| 1 semajno     | 3000,-                  | 1000,-           | 5000,-                  | 1500,-           |

Kategorio A: studento aŭ persono fininta siajn studojn antaŭ ne pli ol unu jaro; maksimuma aĝo: 30 jaroj. Kategorio B: aliaj personoj. Tiuj ĉi kotizoj inkluzivas la program- kaj restad-kostojn. Kromprogramerojn (ekz. perfektiga Esperanto-kurso, ekskursoj ktp.) oni aparte pagas.

# Olimpika donas amikan Greklandon antaŭ la alveno

Flugo kun Olimpika signifas  
unuarangan servadon,  
la plej modernan ekipaĵon,  
bongustegajn manĝojn  
kaj la malnovan tradician gastamon.

Ĉion bezonatan, por ke vi sentu vin hejme.  
Kaj, kiam vi alvenos en Greklando, permesu, ke ni montru  
ĝin al vi, kiel nur ni kapablas tion fari.

Ni helpas al vi elekti vian propran lokon sub la suno,  
el inter la 34 lokoj sur la tero kaj insuloj de Greklando,  
al kiuj ni flugas.

Venu flugi kun ni kaj ĝui nian Olimpikan gastamon.  
Ĉar ni estas la moderna flugkompanio  
kun la antikvaj grekaj tradicioj.

*flugkompanio*  
**OLYMPIC**

La oficiala flugkompanio de la 61a Universala Kongreso

